

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 558 (5) MAJO 1952



Recife : la kunvenurbo de la XIII-a Brazilia Kongreso

(vidu paĝon 131)

45a Jaro	Majo 1952	Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al
N-ro 558 (5)		UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
		Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio		
Fondinto : H. HODLER		
Redaktoro : HANS JAKOB		Jara abono (1952) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Helpredaktoro : MASON STUTTARD		Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj
Ĉion por la redakcio sendu al ESPERANTO Palais Wilson, Genève, Svis. Urgajn informojn sendu rekte al Rickmansworth		Tarifo por reklamoj : 1 paĝo £6 ½ paĝo £3 ¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil. Anoncetoj pri korespondado : 2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond- kupono por ĉiu du da vortoj
Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.		Legantoj en 74 landoj Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj artikoloj :					Paĝo
Paska kunsido de la Estraro de U.E.A. : <i>H. Jakob</i>	..	..	..	..	129
Ĉevalviando : Buĉado de Ĉevaloj	..	..	..	..	137
La milito komenciĝas en la klasĉambro : <i>D-ro Ra</i>	..	..	..	..	140
Junulargastejoj en Danlando : <i>J. Stig Hansen</i> ..	..	..	..	..	141
Arĝentjublea festo en Finnlando : <i>S-ino M. C. Major</i>	..	..	..	..	147
Popolaj moroj kaj kutimoj de Turingio : <i>J. Steppan</i>	..	..	..	..	149
Pri Aŭto-haltigo : <i>D-ro P. Kempeneers</i>	..	..	..	..	152
Kelkaj observoj pri Oslo : <i>Mary Stuttard</i> ..	..	..	..	..	153
Poezio : Letero al Ĉarma Kolegino : <i>Julio Baghy</i> ..	..	..	..	..	157
Fabelo : Iam, kiam la homoj ankoraŭ parolis :	<i>F. C. Ridwit</i>	..	..	..	155
La 37-a Universala Kongreso de Esperanto	..	..	..	..	138, 153
Konstantaj Rubrikoj :					
Centro de Esploroj kaj Dokumentado	..	..	..	..	136
Enigma Konkurso N-ro 68	..	..	..	..	143
Esperantista Vivo	..	..	..	..	160
Internacia Konkurso 1952	..	..	..	..	145
Nia Forumo	..	..	..	..	150
Niaj kunlaborantoj : <i>Joel Vilkki, Finnlando</i> ..	..	..	..	..	146
Oficiala Informilo	..	..	..	..	159
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	158
Tra la Libraro	..	..	..	..	144
Tra la Monda Esperantista	..	..	..	..	131

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 558 (5)

Majo 1952



Paska kunsido de la Estraro de U.E.A.

PASIS la vintro, revenas pli bela tempo. Pasko alvenis. Kaj laŭ jardeka tradicio kunvenas la Estraro de UEA por diskuti kaj decidi pri gravaj aferoj de nia movado. Precize alvenis la membroj de la Estraro en la Esperanto-Domon en Rickmansworth kaj laboris dum tri tagoj kaj duono. La tagordo enhavis pli ol kvindek punktojn.

Prezidis ree la Prezidanto de UEA, Ernfrid Malmgren, kaj plezure ni ĉiuj konstatis: kun konataj fervoro kaj pacienco. Alvenis la Estraranoj, D-ro Kempeneers, David Kennedy, Prof. Lapenna, A. Oliver kaj Hans Jakob.

La tagordo ree montras okulvideble kiom ampleksa fariĝis nia movado, kiom da konkretaj problemoj postulas preni pozicion kaj decidi, sekve akcepti respondecon. Scivolema leganto sin demandas: *Nu, pri kio do oni bezonas kunsidi dum tri tagoj?* Vere nur tiu, kiu dum kelka tempo partoprenas aktive la movadon, povas reale percepti la gravecon de tiu agado.


La raportoj de la Centra Oficejo en Rickmansworth, de la Serva Centro en Ĝenevo kaj de la novkreita, sed jam vigle funkcia, Centro de Esploroj kaj Dokumentado, gvidata de Prof. Lapenna, sekvataj de la necesaj konstatoj, eblaj kritikoj kaj la aproboj, estas, por tiel diri, la

tradiciaj programeroj. Aldoniĝas tiam la kurantaj novaj aferoj kaj estas ili, kiuj postulas la plej grandan atenton.

Gravaj punktoj estas ankaŭ la financoj, la budĝeto, ĝenerale la administrado. Vidiĝas el ĉio, kiom komplika estas la nuna mondo, kiom da senfrukta laboro devas esti farata, nur por ke envenu tio, kion oni rajte devas ricevi.

Kun plezuro ni povas diri, ke la financa stato de la Asocio estas kontentiga, spite al ĉiuj malhelpoj de la nuna tiom komplikita mondo. Malgraŭ la perforta eliro de gravaj landoj el nia rondo, la membrostato kaj kun ĝi la financoj estas tute bonaj. Tion oni dankas al la intima kunlaboro inter ĉiuj organoj de la Asocio, al la bona funkciado de la Centro kaj ne laste al la ofereco de niaj fidelaj membroj, penadantaj kaj pagantaj.

Evidente estas, ke en tiu ĉi resuma komuniko pri la Paska kunsido ne estas eble informi pri aferoj okazontaj, sekvo de niaj diskutoj. Sed pri unu grava punkto ni informu jam nun: la venonta Universala Kongreso, post Oslo, okazos en la kroata ĉefurbo Zagreb, Jugoslavujo. Ĝisfunde studinte la tri invitojn, la Estraro decidis ĉiuvoĉe, sur la bazo de faktoj kaj utilaj konsideroj, akcepti Zagrebon kaj por la postvenonta jaro

*maldekstre—dekstren*

S-ro A. C. Oliver
 D-ro I. Lapenna
 Prez. E. Malmgren
 S-ro C. C. Goldsmith
 S-ro H. Jakob
 S-ro D. Kennedy
 Vic-Prez. P. Kempeneers

je Pasko 1952

(1954) meti Amsterdamon kiel unuan kandidaton por la kongresloko.

Estas ankaŭ aro da aliaj citeblaj punktoj: plibonigo de la revuo, Jarlibro, la biblioteko de UEA, informado ĝenerala, Gazetara Servo, klopodoj ĉe internaciaj kongresoj, rilatoj kun UNESKO kaj aliaj internaciaj organizaĵoj oficialaj kaj privataj. Apud aferoj agrablaj, estas ankaŭ kontraŭaj, signo de vivanta movado, respegulanta la duecon de homaj naturo kaj agado.

Impresaj estas tiaj kunvenoj, kie kunsidas homoj tiom diversaj laŭ deveno kaj karaktero. Jen la prezidanto, svedo, sobra, trankvila, afera, vidalvide al la gvidanto de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado, Profesoro Lapenna, jugoslavo, temperamenta, kelkfoje superbordanta, majstre uzanta la lingvon. Niaj du britoj, observeme kaj

pripenseme sekvas la diskutojn, trankviligante per propra sinteno la kelkfoje tre viglan diskutadon. Sprite kaj sarkasme la vicprezidanto aldonas sian salgrajnon, trovante en taŭga momento feliĉan formulon por eliri de ŝajne neelirebla situacio. Estas plezuro labori en tia medio, en tia vere internacia kamaradeco, kiu baziĝas sur komuneco de idealo kaj longjara sperto.

Pli kaj pli vidiĝas, ke la solvo trovita 1947 en Bern estas taŭga kaj respondas al la efektiva bezono de nia movado. Forestas entute tiu teda diskutado pri organizaj demandoj, kiu iam forprenis tempon kaj humoron. Kun kontento ni ĉiuj rerigardas la vojon trapasitan. Ni plenumis bonan laboron kaj daŭrigos tiel, konvinkitaj ke unueco en la ideo kreas la forton de la agado.

H.J.

ĈU VI IROS AL OSLO ?

Se jes, komencu vian vojaĝon unu semajnon pli frue kaj partoprenu la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør, Danlando, 25/7-1/8, sub aŭspicio de UEA. Speciala karavano, malmultekosta, de Helsingør al Oslo kaj reen estos aranĝata. Petu prospekton pri la kursarangoj ĉe

S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

Socialista tendaro. 1–10 julio okazos en Vieno la internacia tendaro de la Socialista Junularo. La junaj socialistaj Esperantistoj de Vieno aranĝos internacian inform-servon en la tendaro, starigos propran Esperanto-tendon kaj ekspozicios librojn esperantajn kaj socialistajn. Diversaj ekskursoj kaj vizito al la Internacia Esperanto-Muzeo estas projektataj. La partoprenontaj socialistaj Esperantistoj anoncu sin tuj ĉe sia landa (loka) parti-organizaĵo aŭ Esperant-lingve ĉe la Socialista Junularo, Teinfaltstr. 9, WIEN I, Aŭstrujo.

Aŭstria Esperantista Federacio : nova adreso (post Aprilo) Fünfhausgasse 16, WIEN XV.

Monumento en Wörgl. La inaŭguro de la monumento honore je D-ro Zamenhof en tirola urbo Wörgl okazos je 27 julio. La monumento estas busto de nia Majstro, skulptita de samideano Th. Ohnezorge kaj

donacota de li, al la Komitato por la Zamenhof-monumento. La monumento estas el marmoro de Carrara kaj ĝi staras sur granita soklo, du metrojn alta. Iniciatis tiun ĉi honorigon de nia Majstro, samideano Hans Steiner, vicprezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio. La protektoraton transprenis la Federacia Kanceliero de Aŭstrujo, D-ro Leopold Figl. La Honoran komitaton partoprenas eminentuloj el la ŝtata vivo de la lando.

Belgujo

La 36-a Belga Kongreso okazos en Bruĝo, pentekoste, okaze de la 50-jara jubileo de Bruĝa Grupo Esperantista. Informoj : 32 Elf Julistraat, Brugge.

Brazilo

X-III-a Brazila Kongreso okazis en Recife (Pernambuco) Brazilo je 9–16 februaro.

Esperanto agitadis ĉiujn mediojn en la iama Nederlanda Brazilo dum

Jus aperis

en esperanta traduko de E. A. Haugen
la ĉefverko de la norvega literaturo :

Ibsen : PEER GYNT

Prezoj : bind. 15 ŝil., afranko 6p.
broŝ. 12 ŝil. 6p., afranko 6p.

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo



15 monatoj da preparado (okazis specialaj kursoj; ŝtataj kaj urbaj parlamentoj devis diskuti projektojn de leĝoj fine aprobitajn por helpi la kongreson; la gazetaro kaj la radio multe priparolis la aferon), kaj fine la Kongreso mem estis brila sukceso.

La kongreso havis tre longan programon kaj daŭris dum ok tagoj. Ĝi vekis grandan intereson en la klerulaj rondoj de ĉiuj nordorientaj ŝtatoj de Brazilo. Recife estas unu el la plej progresemaj grandurboj de la Nova Mondo kaj inter la plej belaj en Brazilo, pro la pluraj riveroj kaj kanaloj, kiuj ĝin alnomigis la Amerika Venecio. (vidu la kovrilpaĝan bildon).

La solenaj malferma kaj ferma kunsidoj, sub prezido de nia pioniro S-ro Ismael Gomes Braga, efektiviĝis en la granda urba teatro *Teatro Santa Isabel* kaj havis tri eminentajn oratorojn, nome: La Honora Prezidanto de la Kongreso, S-ro Generalo Paŭlo Figueiredo; *Rector Magnificus*, Pastro Francisco

Bragança, kaj la fama historiverkisto kaj filologo Prof. Mário Mello.

Pli ol duono de la kongresanoj estis samideaninoj el diversaj Brazilaj ŝtatoj, kaj ĉie kaj ofte la kongresanoj kantis la propran himnon de la kongreso. La poezio estas verkita de D-ro Ferdinando Larocca kaj la muziko de Prof. Nelson Ferreira.

Oni inaŭguris straton *Esperanto* en la kvartalo Ilha do Leite (Insulo de la lakto). Ĝi estas nova strato, kie oni nun ekkonstruas belajn loĝejojn.

Du diservoj efektiviĝis por la kongresanoj: Meso en la ĉefpreĝejo de Sankta Antono kaj spiritisma kunsido en la aŭlo de Pernambuka Spiritisma Federacio.

Britujo

Esperanto Unuapaĝa Novaĵo. La Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, S-ro W. A. Gething, kun S-ino Gething vizitis Bournemouth kiel gastoj de la lokaj delegitoj kaj Ges. Fisher. Ili vespermanĝis en loka hotelo kun eminentuloj, inter aliaj la



La XIII-a Brazila Kongreso: parolas Pastro Francisco Bragança, Rector Magnificus

Geurbestroj, la estro kaj vicedro de la urbkolegio (la ĉefedukejo en la regiono) kaj la Redaktoro de la ĉefa loka ĵurnalo. Pro ĉi tiu afero okazis tri ĵurnalraportoj el kiuj unu, post intervjuo, estis unuapaĝa novaĵo, kun granda portreto de S-ro Gething! Post ne longe la Bournemouth Esperantistaro organizos grandan tritagan propagandan ekspozicion (vidu kovrilpaĝon 3).

Egiptujo

La Mezorianta Esperanto-Federacio registriĝis ĉe la Ministerio de Sociaj Aferoj en 1951. Ĝi intencas organizi enlandan kongreson dum la somero. Ĝi jam starigis sekcion por perkoresponda kurso kaj ekzistas lernantoj en pluraj urboj.



Kunveno de M.E.F.

Francujo

Feriaj Kursoj. La programo de la kursoj en kastelo Grésillon, aranĝita de la Esperantista instruista societo G.E.E., estas :

15 julio–4 aŭg : kutima somerlernejo de G.E.E. (kursoj komenca, daŭriga, perfektiga) — precipe, sed ne ekskluzive, por instruistoj ;

5–17 aŭgusto : simila aranĝo, sed larĝe malfermita al ĉiuj (nur Esperanto uzata) ;

18–31 aŭgusto : seminario—uzado de nacia lingvo nepre malpermesita, kaj ne estas akcepteblaj komencantoj kaj balbutantoj.

En ĉiu aranĝo, mateno por laboro, posttagmezo kaj vespero por ripozo kaj distro. Eksterlandanoj elektu laŭ la cirkonstancoj, sed al spertuloj konsilita estas la 3-a periodo.

Por detaloj sendu respondkuponon al F-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac, TOULOUSE, Francujo.

Radio. La Radio-Stacio 'Perpignan-Roussillon' dissendas ĉiumerkrede kurson de Esperanto, kiun gvidas R. Llech-Walter kaj R. Gendre. La samaj samideanoj ankaŭ gvidas kurson en lernejo por gejunuloj kun 50 anoj.

Irlando

La kluboj en Dublin kaj Belfast kontentige progresas. S-ro Eamon ó Failáin prelegis irlandlingve en diversaj lokoj, kaj raportoj aperis en *INDIU*, semajna gazeto.

Koreujo

“De Marto de la lasta jaro mi kun vivrestantaj samideanoj en Taegu kaj en Pusan klopodis por restarigi nian movadon, kiu dum iom da tempo ne povis funkcii pro la ĥaoso de la milito. Por la oficejo de Korea Esperanto-Instituto, kiu antaŭ la milito sin trovis en Seoul, ni luis unu malgrandan ĉambron en Chunggu universitato.

De Aprilo 1951 mi rekomencis instrui Esperanton kiel devigan lecionon ĉe Chunggu universitato kaj ĉe Taegu universitato, kiuj ĝis tiam estis devigitaj ĉesigi lecionojn pro la milito. En la rekomenco la nombro de la studentoj, kiuj lernis de mi Esperanton ĉe la du universitatoj estis ĉirkaŭ 200 ; nun ili nombras 260. Kaj de la fino de la lasta jaro s-ro Lee Kjun instruas Esperanton ĉe

gimnazio en Ani. Multaj aliaj lernejoj, ĉe kiuj antaŭ la milito oni instruis Esperanton, bedaŭrinde ankoraŭ ne kapablas rekomenci Esperanto-instruadon pro la malfavoraj cirkonstancoj kaŭzitaj de la milito.

Okaze de la rekomenco de Esperanto-instruado Chunggu universitato represis *Fundamenton de Esperanto* en malgrandigita formo por solvi la mankon de lernolibro, ĉar la monstro milito forrabis la tutan stokon de niaj eldonaĵoj. Ĝi nun estas la tuta Esperanto-eldonaĵo, kiun ni havas. Plej ĉagrenas nin la manko de la rimedo sendi monon alilanden. Pro tio ni, koreaj Esperantistoj, estas devigitaj esti surdaj kaj mutaj al eksterlando, ĉar ni ne povas aboni eksterlandajn gazetojn kaj aĉeti librojn eksterlandajn pro la manko de rimedo sendi kotizojn alilanden; kaj la cirkonstanco de tiu ĉi milite ruinigita lando ne permesas al ni eldoni eĉ nian propran organon Kaj tiel nia movado en tiu ĉi lando estas tute izolita for de la monda movado”

*el letero de S-ro Heng Wi Hong,
UEA Del. en Taegu.*

Maroko

Progres-raporto. En la fino de Marto okazis la ĝenerala kunveno de la Maroka Esperanto-Asocio en Rabat, kiam ĉeestis 69 personoj— nombro por Maroko vere granda kaj neniam antaŭe atingita.

Post la kunveno okazis la konkurso de la perradia kurso de Radio-Maroc, kiu kurso kontentige sukcesis.

Nederlando

Komuna Kongreso de la Nederlanda E.-A. 'L.E.E.N.' kaj la Flandra Ligo Esperantista. Ĉi tiu kongreso estas jam anoncita kiel okazonta en Antverpeno, Belgujo. Ĉar la

cirkonstancoj tamen malebligis tion, la estraroj de la du asocioj decidis, ke ĝi okazos en Rotterdam je Pentekosto. Por informoj oni skribu al la sekretario: S-ro J. M. J. Driesen, Sam. Mullerstraat 7a, ROTTERDAM-W.

Feria Esperanto-kurso por seminari-anoj. La oficejo 'Esperanto ĉe la Instruado' organizos por gelernantoj de seminarioj por geinstruistoj Esperanto-kurson en la konferencejo 'Weltevreden' en Kerk Avezaath apud Tiel; de lundo 21 julio ĝis sabato 26 julio. La kursgvidanto estos S-ro J. U. Hommes, membro de la Nederlanda Esperanto-Ekzamena Komitato, instruisto en Apeldoorn. Ne nur tiuj gelernantoj, kiuj jam studis Esperanton, sed ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne komencis la studadon, povos partopreni (eventuale oni aranĝos du kursojn: unu por komencantoj kaj unu por progresintoj). La kurskotizo estas (inkluzive de loĝado kaj manĝoj) ned. guld. 10.—. Ankaŭ eksterlandaj geseminarianoj-Esperantistoj estas bonvenaj. Aliĝon sendu al la oficejo 'Esperanto ĉe la Instruado', J. P. Sweelinckstr. 2, DEVENTER.

Svedujo

Ŝtate subtenita kurso pri 'La nuntempa Svedlando' okazos en la altlernejo Bohusgarden, apud Gotenburgo (survoje al Oslo). La prelegoj traktos aktualajn partojn de la sveda kultura kaj teknika vivo: la modernan literaturon, edukadon, sciencon, arton, muzikon, sociajn aranĝojn kaj industriojn. Prelegistoj: Red. Einar Adamson, Ing. S. Alexandersson, Ĉefinstruisto Einar Dahl, Ĉefred. H. Johansson, D-ro J. Stenström, Pres. de Sveda E.-Federacio, S-ro J. Strönne, D-ro F. Szilagyi, kaj Rektoro K. Söderberg.

Dato : 27 julio–2 aŭgusto. Ĉiutage okazos 2 lecionoj antaŭ- kaj du posttagmeze. La lernejo troviĝas tute apud la maro (belegaj banstrandoj). En la vesperoj estos amuzaj programoj, en kiuj ankaŭ partoprenos la svedoj, kiuj paralele studas en kurso por stud- kaj grup-gvidantoj. La prezo por la kurso estas 75 sved.kr. (por instruado, loĝado, manĝado kaj studekskursoj). Post prezentado de rekomendoj la instituto havas eblecon al kelkaj kursanoj malaltigi la kotizon. Demandojn pri la kurso kaj aliĝojn (plej malfrue la 1-an de junio) sendu al Sveda Esperanto-Instituto, Sibyllegatan 83, STOCKHOLM.

La Universitato en Lund uzas Esperanton. (Vidu paĝon 137.)

Svislando

La Svisa Esperanto-Tago, jara kunveno de la Svisa Esperanto-Societo, okazis ĉijare en Basel, je 8 marto. Post la kutima tagordo, la ĝenerala kunveno de la SES longe diskutis la proponon adapti la kotizon je la nuna nivelo de prezoj, kion oni nelogike nomas altigi. Tiu ĉi propono estis malakceptita. Sufiĉan tempon prenis egale la eterna diskutobjekto : la gazeto,—problemo neniam solvota kontentige, se oni opinias, ke bela ampleksa periodaĵo en Esperanto povos esti malpli kosta ol tia en nacia lingvo. La malnova komitato reelektiĝis kun danko por la farita laboro. Kiel Honora Membro de SES elektiĝis samideano Kuhn el Zürich por fidela agado longjara. La bankedo trankviligis la korojn kaj ĝis la kvara horo posttagmeze la tuta tagordo estis prilaborita. La amuza parto povis reteni la kunvenintojn ĝis vespero kaj ĉiuj disiris kontentaj, dankante la organizanton de la jarkunveno, nian sindonan Doktoron Bader.

Esperantista Olimpia Servo

Olimpiaj ludoj kiel internacia okazaĵo ĉiam havas lingvoproblemojn kaj tial ĉagrenas la aranĝantojn. Tio estas konstatebla ankaŭ en la aranĝoj por la XV Olimpiado en Helsinki, Finnlando. Kiam la lingva programo estas pritraktata en la organiza komitato la Esperantistoj provis konvinki tiun komitaton pri la taŭgeco de Esperanto, sed senrezulte.

Oni atendas 150.000 eksterlandanojn kaj jam konstatas, ke inter ili estas multaj Esperantistoj. Pro tio la diversaj Esperanto-organizaĵoj starigis servokomitaton :

Esperantista Olimpia Servo,
Töölöntullinkatu 7.A.2,
HELSINKI—TÖÖLÖ,
Finnlando.

La Prezidanto estas Kaarlo Jokinen, D. de UEA en Helsinki.

E.O.S. estas provizora kaj ne-oficiala organizaĵo funkcia per la helpo de volontuloj sen ia oficiala monsubteno, sed ĝi estas registrita de la Olimpia Komitato kaj havas regulan kontakton. Petante informon, oni bonvolu aldoni respondkuponon.

Dum la Ludoj ĝi aranĝos du kunvenojn por Esperantistoj, kaj havos tuttagan telefondeĵoranton ĉe S-ro A. Ruhanainen, Helsinginkatu 6.B.50.

Loĝejoj : ĝi ne devigas sin aranĝi loĝejojn por vizitantoj. Se oni petos, ĝi provos, sed tute ne garantias sukceson.

Enirbiletoj : malmultaj estas rezervitaj por enlandanoj, sed oni nun vendas ilin eksterlande.

Propagando : ĉar la Olimpia Komitato jam decidis ne uzi Esperanton, ne valoras sendi al ĝi leterojn petante tion. Sed Esperantlingvaj celenhavaj leteroj estas utilaj : sendu al Organiza Komitato, XV Olympia, Helsinki.



Centro de Esploroj kaj Dokumentado
300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Kelkaj gravaj renkontiĝoj

OKAZE de sia mallonga vojaĝo en Parizo, Arras, Bruselo kaj Nederlando, Prof. Ivo Lapenna, la Honorofica Direktoro de la Centro, havis plurajn gravajn konferencojn kaj renkontiĝojn, dum kiuj estis ellaboritaj planoj pri la plua agado por progresigi la aferon de la Internacia Lingvo en diversaj medioj.

En Parizo Prof. Lapenna havis 2 konferencojn kun la departementaj direktoroj de UNESKO, s-roj Elvin kaj Herzig. Surbaze de antaŭe ellaborita plano dum aparta kunveno kun S-ro Durrant, la komisiito de UEA por UNESKO aferoj, Prof. Lapenna eksplikis al la menciitaj ĉefoj de UNESKO la starpunkton de la Esperanto-Movado koncerne diversajn demandojn, tuŝantajn la problemon de komuna lingvo. Li trovis multe da komprenemo precipe koncerne la formojn de plua kunlaborado inter UNESKO kaj UEA. UNESKO esprimis sian dankon pro la dokumentaro de la Centro, kiu multe helpas al ĝi ricevi klaran bildon pri la ĝis nun atingitaj rezultoj de Esperanto.

En Arras, dum 2-taga konferenco kun la Prezidanto de UEF, s-ro Ark. Philippe, estis precipe tre detale pritraktita la demando pri interesigo de la Francaj Parlamento kaj Senato por nia afero. Tiucele estis ellaborita detala plano kaj skizitaj la unuaj dokumentoj por kreo de grupoj en la Parlamento kaj en la Senato, pere de kiuj la franca movado antaŭenigos nian aferon en tiuj medioj. La tuta plano antaŭvidas tri etapojn (patrona

komitato — deputita kaj senatana grupoj — leĝoprojektoj favore al Esperanto), el kiuj la du unuaj kredeble realiĝos jam en tiu ĉi jaro.

En Bruselo okazis konferenco kun la Vicprezidanto de UEA kaj Prezidanto de la Belga Ligo, D-ro P. Kempeneers, dum kiu estis esploritaj la eblecoj de simila agado en la belgaj superaj instancoj. D-ro Kempeneers kaj S-ro Ark. Philippe havos apartan kunvenon por harmoniigi la aktivecon en la du landoj.

En Nederlando okazis publika prelego, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 300 esperantistoj el Nederlando, el Antverpeno, Bruĝo kaj aliaj belgaj urboj. Post la paŭzo okazis alia prelegeto, en kiu estis prezentitaj la ĝisnunaj rezultoj, atingitaj de la CED.

En aparta konferenco kun la nederlandaj kunlaborantoj de CED estis detale pridiskutitaj la celoj de la Centro kaj la formoj de kunlaborado en la estonteco. Ĉiuj kunlaborantoj ricevis apartajn taskojn. En speciala konferenco s-ro Keur informis pri la kontentiga progresado de sia enketo pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado.

La Direktoro de la Centro estis akceptita de la Nederlanda Ministro pri Edukado, Prof. Rutten. La aŭdienco daŭris pli ol duonan horon. Estis priparolitaj la enkonduko de Esperanto en la nederlandajn lernejojn kaj la problemo de komuna lingvo en internaciaj organizaĵoj, precipe en UNESKO. La Ministro esprimis sian dankon pro la

Scienca Esplorado.**Ĉevalviando : Buĉado de Ĉevaloj****Grava alvoko de la Universitato de Lund, Svedujo**

CE la Universitato de Lund, Svedujo (en skanio, la suda parto de Svedujo) profesoro de la universitata etnologia arkivo esploros la buĉadon de ĉevaloj kaj la manĝadon de ĉevalviando. Ĉar nenie ekzistas sufiĉa literaturo pri tiu temo kaj ĉar la esplorado ampleksos la tutan mondon, la universitato deziras uzi Esperanton por tiamaniere atingi ĉiujn landojn kaj ĉiujn popolojn.

Pere de Sveda Esperanto-Federacio la universitato pro tio petas ĉiujn helpi ĉirilate kaj afable serĉi respondojn al la subaj demandoj. Ĝi esperas, ke vi ĉiuokaze sendos respondon, eĉ se vi ne sukcesos ricevi kompletajn detalojn. Ni kalkulas je tio, ke vi faros vian plejebilon.

La respondoj estu ĉe la universitato :
por eŭropaj landoj plej malfrue la 1-an de julio 1952,
por ekstereŭropaj landoj la 1-an de septembro 1952.

La respondojn vi afable sendu en Esperanto al
La etnologia arkivo, la Universitato de Lund, Finngatan 8, LUND, Svedujo.

La demandoj :

1. Kia estis antaŭe la opinio pri ĉevalviando kiel nutraĵo kaj kia ĝi nun estas ?
2. Ĉu la mortigado de ĉevalo, hundo kaj kato kaŭzis socialan malhonoron, kaj kiel tiukaze tio montriĝis ?
3. Ĉiu ekzistas speciala persono, kiu havis la taskon mortigi ĉevalojn, hundojn kaj katojn ? Kiel li nomiĝis kaj kiel li estis akceptata ?
4. Kiamaniere okazis la mortigado de tiaj bestoj ?

daŭrigo (de p. 136)

dokumentaro, kiun liveris al li la CED en nederlanda traduko kaj petis pri plua regula alsendado.

En 3-hora konferenco kun la Rektoro de la Universitato en Amsterdam, Prof. Bregstein, estis priparolitaj precipe la demandoj tuŝantaj la problemon de komuna lingvo en la scienco.

Dum la vojaĝo okazis ankaŭ du gazetaraj konferencoj. Aperis tre objektivaj informoj en unu franca kaj kvin nederlandaj gazetoj, kiuj apartenas al la plej seriozaj kaj plej gravaj en la lando.

Provizore ne estas eble publikigi ĉiujn rezultojn de la menciitaj konferencoj, sed oni povas diri, ke ili inspiras multe da optimismo por la baldaŭa estonteco.

Novaj donacoj al la C.E.D.

	£	ŝ.	p.
Donacite ĝis la 1 Feb. 1952 ..	150	9	0
Anonima donacinto,			
Bournemouth	10	0	
F-ino N. Hanson, Halifax ..	7	6	
Centra Dana Esperanto-Ligo ..	3	0	0
Anonima donacinto, Hago ..	1	0	0
F-ino M. Vermaas, Roterdamo	10	0	0
<i>Sume la 25-an de Marto ..</i>	<u>165</u>	<u>6</u>	<u>6</u>



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtgirokonta : 153. 85.

Honora Komitato :

Oscar Torp, ĉefministro

Halvard Lange, ministro pri eksterlandaj aferoj

Trygve Bratteli, ministro pri financoj

Lars Moen, ministro pri eklezio kaj edukado

Brynjulf Bull, urbestro de Oslo

B. L. D. Brekke, ĉefpastro, skoltestro de la Norvega Skolta Asocio

Ch. Erlandsen, administra direktoro de la Norvega Asocio de Entreprenaj Mastroj

Carl Henry, parlamentano

Alfhild Hovdan, estrino de la Vojaĝtrafika Asocio por Oslo, turisma ĉefo por Oslo

Ingebrigt Johansson, profesoro pri matematiko en la Universitato Oslo

G. B. Lampe, administra direktoro de la Landa Asocio por Vojaĝtrafiko en Norvegujo, prezidanto de la Rotario Klubo de Oslo

Jac. Mangers, episkopo

Odd Nansen, arkitekto, prezidanto de "Unu Mondo" (norvega sekcio de Monda Movado por Federacia Mondregistaro)

Sverre Nilsen, rektoro, prezidanto de la Landa Koopera Asocio de Norvegujo

Konrad Nordahl, prezidanto de la Landa Asocio de Laboristaj Sindikatoj

Axel Otto Normann, teatra ĉefo, prezidanto de la Internacia Teatra Instituto

Kåre Norum, instruisto, prezidanto de la Instruista Asocio de Norvegujo

Ragnv. Rian, komercisto, Ĉefdelegito de U.E.A. en Norvegujo, Honora Membro de N.E.L. kaj de U.E.A.

Svein Rosseland, profesoro pri astronomio, direktoro de la Instituto por Teoria Astrofiziko, Dekano de la Naturscienca Fakultato en la Universitato Oslo, prezidanto de la Scienca Akademio en Oslo

Arthur Ruud, departementa oficejestro, prezidanto de la Sporta Asocio de Norvegujo, prezidanto de la Norvega Ligo por la Unuigitaj Nacioj, prezidanto de la Olimpiada Komitato de Norvegujo

Vegard Sletten, redaktoro, prezidanto de la Junula Asocio de Norvegujo

O. Brochmann Sletterød, inĝeniero, Honora Membro de N.E.L.

Johannes Smemo, episkopo de Oslo

Emil Smith, profesoro pri greka lingvo kaj kulturo en la Universitato Oslo

K. B. Sellesnes, gimnazia direktoro, prezidanto de la Norvega Asocio de Gimnaziaj Lektoroj

Egil Storstein, urba konsilisto pri financoj, Oslo

Rolf Stranger, parlamentano, vicurbestro de Oslo

Erling Sørli, oficejestro, prezidanto de la Packonsilantaro de Norvegujo

Aksel Zachariassen, sekretario de la Laborista Kleriga Asocio

Kr. Aamot, direktoro de la kinoj de Oslo, prezidanto de la Landa Asocio de Komunumaj Kinoj

Esperantaj Turistaj Tagoj en Gotenburgo : La Gotenburgaj esperantistoj alvokas partoprenantojn de la kongreso en Oslo kaj aliajn esperantistojn viziti la Esperantajn Turistajn Tagojn en Gotenburgo 31/7 kaj 1/8 1952. Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj en la urbo. Vizitoj en belaj lokoj, industrioj, muzeoj, amuzejoj. Loĝo kaj manĝo por malalta prezo. Nenia kongresa kotizo. Limdate por aliĝo 30/6 1952. Informojn de Esperantaj Turistaj Tagoj, Skonertg. 1, Göteborg Vr., Svedujo.

Junula Renkontiĝo en Karlskoga : La klubo "La Aglo" aranĝas junularkunvenon en Karlskoga 25/7 ĝis 1/8 1952. Oni volas akcepti ĝis 200 gejunulojn tre malmultekoste. Por informoj oni sin turnu al E. Bonander, Kungsvägen 5, Karlskoga, Svedujo.

K.E.L.I.-Konferenco : Tiu aranĝo okazos ĉi-jare en Fredtun apud Stavern, 10 km. de Larvik en Norvegujo. Malfermo 29 julion, fermo 1 aŭg. kaj ekiro al Oslo. Oni sin turnu al F-ino M. Fjaerem, Neberggaten 9-B-6, Oslo, Norvegujo, por ĉiaj informoj.

Komuna Manĝado : Ni anoncas rabaton de 30% por gejunuloj ĝis 15 jaroj.

Fervoja Rabato : La Norvega Ŝtatfervojo anoncas rabaton por vojaĝoj en Norvegujo sur ordinaraj trajnoj kaj por veturoj de ne malpli ol 100 km. La rabato ne validas por dormkupeoj kaj ekspresoj.

Vizoj : Germanoj, Aŭstroj kaj aliaj, kiuj bezonas vizon por Norvegujo

nepre tuj sin turnu al la norvegaj konsuloj por havigi al si vizojn. Por akceli la aferon L.K.K. daŭre sendas nomojn de novaj aliĝintoj al la polica kontrolkontoro en Oslo tiel ke pet-skriboj ricevu tujan aprobon.

Statistiko : (ĝis 31 mar.) Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 8, Belgujo 19, Brazilo 1, Britujo 175, Danujo 39, Ebura Bordo 2, Finnlando 51, Francujo 87, Germanujo 67, Hispanujo 2, Indonezio 1, Irlando 1, Italujo 40, Izraelo 2, Jugoslavio 6, Kanado 1, Kenjo 2, Nederlando 40, Norvegujo 198, Polujo 2, Portugalujo 1, Svedujo 191, Svislando 14, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 5. Sume 960 el 28 landoj (lastmomenta sciigo : 1070).

Mason Stuttard, K.K.S.

Kial mi batalas por Esperanto ?

Dum la Universala Kongreso en Oslo okazos, kiel la antaŭajn jarojn, oratora konkurso por la gejunuloj ĝis 28-jaraj. La temo de la konkurso estas : Kial mi batalas por Esperanto. La premioj estas diplomoj kaj libroj. Krome, la Svisa Esperanto-Societo donis apartan premion de 100 sv. fr.

La gejunuloj, kiuj deziras partopreni en la konkurso, bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ al la Loka Kongresa Komitato en Oslo menciante sian nomon, kongresnumeron kaj aĝon. La resumo de la regularo aperis en la oficiala bulteno n-ro 2 de la L.K.K.

Estas tre dezirinde, ke multaj gejunuloj partoprenu tiun konkurson kaj riĉigu la Kongreson per la freŝeco de siaj ideoj.

D-ro Ra :

La milito komenciĝas en la klasĉambro

EN la nuna momento troviĝas en la mondo rondsume 500 milionoj da infanoj. Kiom el ili iam estos viktimoj de "neevitebla milito"? Aŭ ĉu ne plu okazos militoj? Kio estas la kaŭzo de la mistike fieraj preteco de la homoj obei al la sangoverŝa fantomo, la vampiro, la milito, malgraŭ ĉia racio kaj timo?

Kvin milionoj da infanoj lernas en la lernejo legi kaj skribi en la lingvo de sia popolo, en la gepatra lingvo; sed krom tio ili lernas, ke ilia lando, la gepatra lando, estas la plej bela kaj ilia popolo la plej bona sur la tero. Ili lernas, ke ili estu fieraj pri la historio de sia popolo. Ili kompreneble lernas ankaŭ, ke ekzistas aliaj popoloj, sed ili ne estas tiel indaj, kiel, la propra. Ekzistas antaŭ ĉio la malbonaj, malamikaj najbaroj, pri kiuj oni devas ĉiam esti singarda kaj kiujn oni devas ĉiam malestimi ĉar ties historio estas rakonto de teruro kaj fiago. Oni do inokulas en la impreseblan spiriton de la infanoj la dolĉan malvirton de la nacia fiero, la venenon de la popolmalamo. La spirita kaj psikologia preparado al la milito komenciĝas en la klasĉambro. Sekve estas entute ne mirige, ke la anoj de la diversaj gepatraj landoj, arigitaj ĉirkaŭ la nacia idolo, malice kaj senfide observadas unuj la aliajn, izolitaj de la vepraro de antaŭjuĝo, malkompreno kaj malicaj falsaj asertoj.

Pri nenio la moderna homo tiel fieras, kiel pri la scienco. Tamen nenio estas tia mokego pri la spirito de la scienco, la volo al objektiva vero, kiaj la bildoj historiaj instruataj en lernejoj de ĉiuj nacioj, ĉar tie festas veraj triumfoj de eraro, nescio,

falsigo, nacia fiero, nacia malsimpatio. Ĝis kia grado estas eblaj la idolfarado kaj la aroganta heroismo de la propra popolo, tion montras la historiaj libroj kaj la legolibroj de la Hitlera epoko, sed ankaŭ aliaj nacioj produktis miregaĵojn en tiu rilato.

Kiel post la unua mondmilito, kreskas ankaŭ nun la kompreno ke, por doni ŝancon al la direkto de la paco, nenio estas tiel necesa, kiel la korektado de la historiaj bildoj de la popoloj. Tio estas nedireble malfacila tasko; ĝi postulas multe da takto, singardo, veremeco, pacienco. Kaj ĝi povos esti solvata nur kiam ĝi estos traktata de persono kun konscie eŭropa karaktero.

Kiel agon de prudento kaj bona volo oni devas glori la internacian historiistan kunvenon, kiu okazis en 1951 en Brunsviko (Braunschweig). Kunvenis historiistoj el Anglujo, Francujo, Nederlando, Danujo, Svedujo, Norvegujo, Svislando, kaj Ameriko. Ili kunvenis por interparoli kun germanaj kolegoj la problemojn de objektiva historiskribo. Oni traktis demandojn malnovajn, naciajn antaŭjuĝojn, kiuj devis esti traktataj tre delikate. Ekzemple la konflikton pri la rilatoj inter Schleswig-Holstein kaj Danujo.

La tempo evidente estas pasinta en kiu estas permeseble por la nacioj disvastigi danĝerajn erarojn de la historio en la lernejo. Pli kaj pli oni komprenas, ke la tendenco kaj unuflanka prezentado de okazaĵoj encerbigas danĝeran mondkoncepton, kiu poste preskaŭ ne estas korektebla.

*Tradukis, kun permeso de la aŭtoro,
Armin Schorcht, Hannover.*

J. Stig Hansen :

Junulargastejoj en Danlando

SURVOJE al la kongreso en Oslo multaj kongresanoj travojaĝos Danlandon. Tiu lando kreĝis en la glacia epoko el materialoj, kiujn transportis la glacio for de la montoj de Skandinavio. Ĝi estas malalta lando—la plej alta punkto troviĝas ĉ. 173 m. super la marnivelo—sed kun multaj montetoj. La areo de la lando estas ĉ. 44.000 kvadratkilometroj kaj ĝi havas iom pli ol kvar milionojn da enloĝantoj. Ĝi konsistas el la iom granda duoninsulo Jutlando (dane : Jylland) kaj multego da pli-malpli grandaj insuloj kaj insuletoj.


Multaj belaj kaj grandaj pontoj super markoloj interligas la partojn de la lando. La t.n. “Storstrømsbro” inter la insuloj Selando (Sjælland) kaj Falster estas longa 3.2 km, kaj estas la plej longa ponto en Eŭropo.

Venu al Danlando ! Kongresanoj povas aĉeti specialan “rondvojaĝan bileton” (prezo reduktita je 25%) de Fredericia al Kopenhago kaj Helsingør, kie okazos la Esperanta

Ferio-Semajno en la Internacia Altlernejo (*vidu p. 130*)

Ĉie troviĝas bonaj junulargastejoj. Entute en Danlando estas 160 gastejoj por la junularo kun ĉ. 10.000 litoj. En la plimultaj landoj ekzistas unu organizaĵo kiu prizorgas la aferojn de la junulargastejoj kaj migrantoj, sed en Danlando estas du grandaj asocioj. Ili estas Herbergs-Ringen (por la organizo de junulargastejoj) kaj Dansk Vandrelaug (asocio de danaj migrantoj). Tiu lasta havas 65.000 membrojn, el kiuj ĉ. 55.000 estas aktivaj migrantoj.

Herbergs-Ringen elsendas ĉiumonatan bultenon al ĉiuj gvidantoj (gepatroj) de la junulargastejoj, kaj ankaŭ Dansk Vandrelaug havas sian propran membrogazeton ĉiumonatan, kiun ricevas ĉiu membro de la asocio. En la lastaj jaroj Dansk Vandrelaug publikigas en sia organo Esperanto-kurson en la t.n. “Esperanto-angulo” (Esperanto-Hjørnet). Certe la disvastiĝo de Esperanto kiel helplingvo—kaj precipe kiel lingvo por vojaĝ-



Dana junulargastejo en Kollund



Migrantoj marŝantaj

antoj—multege pliigus la nombron da vojaĝantaj gejunuloj.

Jam de sia fondiĝo D.V.L. aranĝas karavan-vojaĝojn al la eksterlando kaj antaŭ la milito eĉ aranĝis tre malmultekostan vojaĝon al Usono (Niagara). Post la milito la asocio fondis sian propran vojaĝoficejon—Ungdommens Rejsebureau t.e. Vojaĝoficejo de la Junularo—kies adreso estas Kultorvet 7, København K. Dum la pasintaj lastaj jaroj ĝi aranĝis multajn karavan-vojaĝojn, ekz. al Italujo, Norda Afriko, Jugoslavujo, k.s.

Herbergs-Ringen kaj Dansk Vandrelaug tre intime kunlaboras, kaj la adreso de ambaŭ asocio estas: Vesterbrogade 35, København V. La organizaĵoj korespondas Esperante—inkluzive de aliaj lingvoj—kaj havas specialan korespondan fakon, la “Plumamika Fakoj”, sekcion por aranĝo de korespondado inter diversnaciaj homoj, kiu estas je dispono. Informojn pri Danlando oni povas ricevi de Turistforeningen for


Danmark, Banegaardsplads 5, København V.

(Noto: S-ro J. Stig Hansen estas eksprezidanto de la D.V.L. kaj nun estas turistĉefo en Oslo. Li komencis studi Esperanton dum la pasinta aŭtuno kaj jam aperigis dekon de artikoloj pri Esperanto en pluraj gravaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Li estas absolute konvinkita pri la valoro de Esperanto kiel turisma lingvo.—Red.)

daŭrigo (de p. 143)

12. intermontejo—kaŝilo; 13. juvela ŝtono—mamulo; 14. skeletparto—sekreta observanto; 15. parfuma substanco—domparto; 16. malmoliginta haŭto—motivo; 17. duo—birdo; 18. eksplodilo—fizionomio; 19. skribilo—birda kapelkreskaĵo; 20. mizerulo—batalo; 21. ŝuo—ŝipeto; 22. tabuleto—senrajta homo; 23. ornamaĵo—paserbirdo; 24. malsano—rapidkura kvarpiedulo; 25. knedaĵo—funkciulo de religio; 26. babili—garde rondiri; 27. metalo—vestaĵo de ekleziulo; 28. kontraŭstari—disrompi; 29. metala stango—korpoparto.

Enigma Konkurso N-ro 68



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 66.

N-ro 146. Horizontale : perko (krepo) ; akre (kare) ; kora (arko) ; ganti (tangi) ; brodi (birdo) ; rasti (stari) ; rekta (kreta) ; budo (dubo) ; orlo (rolo) ; torso (ostro).

Vertikale : peko (kepo) ; krabo aŭ brako (barko) ; kial (laki) ; klaso (lakso) ; dramo (mardo) ; magia (imaga) ; sabro (sobra) ; kion (koni) ; ebria (rabie) ; roko aŭ loko (koro aŭ kolo).

N-ro 147. La patriotismo ne estas malamo kontraŭ aliaj nacioj, sed amo al la propra popolo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 64-a konkurso : S-ro L. Staal (Ned.) 166, S-ro T. K. Slade (Brit.) 157, S-ro F. Taylor (Brit.) 154 p.

Enigmo N-ro 151 : El la literoj de ĉiu paro da vortoj vi povas formi novan vorton. La komencliteroj de tiuj vortoj formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. 1. gardi—mapo ; 2. peto—oazo ; 3. rasti—kiso ; 4. tero—kavo ; 5. inko—tramo ; 6. relo—dano ; 7. pasi—mito ; 8. peono—trie ; 9. mapo—regi ; 10. greno—meti ; 11. tubo—arte ; 12. fosto—rapo ; 13. arte—penso ; 14. kano—spiti ; 15. lito—bruna ; 16. dato—keno ; 17. stabo—lumi ; 18. tial—nuko ; 19. trefo—angio ; 20. kial—arda ; 21. poste—kelo ; 22. lado—armi.


Enigmo N-ro 152. a - a - a - a - be - bis - bo - bro - bro - bron - ci - ci - ci - da - den - den - di - di - di - do - do - do - dre - flo - fo - fo - gi - gir - gla - go - go - go - ĝe - his - in - ka - ka - ka - kan - ki - ki - ko - ko - ko - kre - kvi - la - lan - li - lo - lo - lo - lo - lo - lo - ma - mi - mi - mo - na - ni - no - no - no - o - o - o - o - o - pa - pan - paŝ - pe -

pe - pes - pi - pro - pru - ra - ri - ro - ru - sa - se - se - spe - sta - ste - stu - ta - ta - ti - tis - to - to - to - to - to - to - to - to - tri - trum - ven - ver - zin - zo - zo.

El la ĉi supraj 108 silaboj formu 30 okliterajn vortojn, kies triaj literoj en la donita sinsekvo formas esprimon el la Proverbaro. 1. brutgardisto ; 2. saĝa ; 3. rezino ; 4. originala enloĝanto ; 5. komercaĉi ; 6. piedvesto ; 7. nekomuna ; 8. krispa brasiko ; 9. antikva monumento ; 10. muzikilo ; 11. trisilaba versero ; 12. manĝaĵo ; 13. librolisto ; 14. envolvaĵo ; 15. signalilo ; 16. brulaĵo ; 17. spicaĵo ; 18. instruisto ; 19. popola maksimumo ; 20. kermesa amuzilo ; 21. subvesto ; 22. malsano ; 23. tago ; 24. testamenta aldono ; 25. antisepsa substanco ; 26. nobelo ; 27. ornamaĵo ; 28. lernanto ; 29. bulbfloro ; 30. dormigilo.

Enigmo N-ro 153. La ĉi-subaj klarigoj prezentas post ĉiu numero du vortojn el kiuj la duan oni trovas, simple metante unu literon antaŭ aŭ inter la literojn de la unua vorto. La novaj literoj formas en la donita sinsekvo esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof. Jen la klarigoj : 1. rondo—desegnilo ; 2. vestaĵo—monunuo ; 3. hazardo—korpa ludo ; 4. ligna ujo—longforma altaĵo ; 5. kartonfolieto—legomo ; 6. patrujo—piedparto ; 7. maŝinkudri—peni ; 8. ŝipeto—provizora konstruo ; 9. noktbirdo—fondo ; 10. spicaĵo—metala fiksilo ; 11. fluidaĵo—frukto ;

daŭrigo sur p. 142



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

Recenzoj enhavas la proprajn opiniojn de la recenzintoj.

Ili ne necese estas laŭ la oficiala starpunkto de U.E.A.

***Spiritaĵ ekzercadoj** de S-ta Ignacio de Loyola, rekte tradukitaj el la hispana originalo laŭ eldono de *El Mensajero del corazón de Jesŭs*. Tradukis Eusebio Maynar, Zaragoza. 208 paĝoj 13×9cm. Prezo 1ŝ. 6p., afranko 3p.

La katolika libraro en Esperanto, ĉu liturga, ĉu edifa aŭ beletra, ankoraŭ ne estas tiom ampleksa kiom oni rajtus atendi, konsiderante la nombron de katolikaj Esperantistoj. La libraro katolika nun pliriĉiĝis per la supra traduko de verko je kiu efektive povas esti aplikata la frazo: "Libroj havas sian sorton". Sub plaĉa eksteraĵo kaj zorge presita prezentiĝas tiu ĉi ĉefa libro de la Jezuita Ordeno. La ekzercadoj spiritaĵ celas gvidi la leganton al la sinregado kaj la regado de la kruda instinkto, alivorte la estrado de l'karno per la spirito. Rapida trailego de la Esperanta traduko kaj komparante erojn kun alilingva eldono ni povas sincere gratuli la tradukinton pri tiu ĉi laboro. La gratulo estu akompanata de la deziro ke tiu ĉi libro trovu vastan interesularon.

H.J.

Mladý Dopisovatel (Juna korespondanto). Dediĉita al nia Esperantista Junularo de Julie Supichová. 24 paĝoj, 10 × 11.5 cm. Aldono ĉe *Esperantista*, novembro 1951.

La nelacigebla kaj ĉiam juna Julie Supichová kompilis diligente frazaron

por la juna korespondanto, en ĉeĥa lingvo kun apuda traduko en Esperanto. Zorge kunmetita, la libreto trovos certe aprobon ĉe tiuj al kiuj ĝi estas dediĉita.

H.J.

***Kiel Aŭtodidakto al Pedagogia Scienco** de Klemenŝ Wieczorek, eld. Limburger Vereinsdruckerei. 21 × 14.5 cm., 39 paĝoj, broŝ. 3ŝ. 3p., afranko 2p.

La titolo de ĉi tiu verko estas neklara, la enhavo eĉ pli. La verkisto nomas ĝin "scienca verko", kiu temas pri pedagogio. Inter la ĉapitroj troviĝas la jenaj titoloj—*La Volo*, *La Animo de Infano*, *La Instruanto*, kaj *Esperanto kiel Reformilo*—sed ĉi tiuj temoj ne estas lerte traktitaj. Poste sekvas resumo de iuj ideoj de bonekonataj edukistoj, inter ili Sokrates, Platono, Rousseau kaj Pestalozzi. Traleginte ĉi tiun libron mi povas imagi, ke la verkisto iam englutis multan informon pri pedagogio, malbone digestis ĝin, kaj poste, kun ofta ripeto de ideoj kaj frazoj, redonis tiun informon laŭ siaj propraj vortoj, kiel mikspoton ne tre allogan. La rezulto estas galimatia kiu aldonas malmulton al la pedagoga scienco.

La Esperanta stilo estas tre peza, ĉar tro ofte la aŭtoro uzas longajn kunmetitajn vortojn, ekz. "didaktopsikologio", "teoristsistemo", "ekkonkapablo", "historifilozofia". En scienca verko estas pli bone uzi

fakajn vortojn. Ankaŭ, la uzado de la sufiksoj “ig” kaj “iĝ” estas plurfoje malĝusta. Per ĉi tiu verko oni neniam povus diveni, ke Esperanto estas bela kaj simpla lingvo. Fine, se iu kuraĝas stumbli tra labirinto de duonbakitaj ideoj, jen libro por li!

D. Kennedy.

***Niko kaj Nina** de Joseph F. Berger, eld. Limburger Vereinsdruckerei, Germanujo. 19 × 12 cm., 70 paĝoj, broŝ. 4ŝ. 3p., afranko 2p.

Jen simpla legolibro, kiu estas vera romano miniatura, pritraktanta la vivon de du gejunuloj ek de la frua infaneco ĝis la edziĝovojaĝo. La unua duono ja estas dolĉa kaj delikata infanstudo, kaj Niko kaj Nina estas vivantaj infanoj. Poste, bedaŭrinde, la rakonto ŝajnas iĝi iomete tro skiza, kaj la gejunuloj iom tro “perfektaj” laŭ karaktero, tiel ke oni perdas iomete da intereso. Sed oni volonte legus la saman historion kvinoble plenan de detaloj.

Tamen la aŭtoro celas “postkursan legolibreton”, kaj sendube pli saĝe estas ne timigi la novelerninton per trograndeco. Kian ajn mankon ĝi havas, la libreto certe atingas tiun celon. Bonguste kaj bele presita (kvankam sur apenaŭ inda papero), ĝi ŝajnas enhavi nur du preserarojn: **ŝia**, p. 45, 1.8 (*lia*) kaj **ĉiuja**, p. 60, 1.14 (*ĉiujn*). Ĉi tiun allogan libreton helpas simplaj kaj klaraj ilustraĵoj (sed kial vortumitaj germanlingve?). Min aparte ĉarmis la bildo de la “eledilo kaj krokofanto”!

Leginte, ke *Niko kaj Nina* estas “lingve aprobita de la Lingva Sekvio de Germana Esperanto-Asocio”, oni iom surpriziĝas trovante iujn ajn eraretojn, sed kelkaj ja preterlasiĝis;

Internacia Konkurso 1952

Stato je 31 Marto 1952

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Izraelo ..	350	485	138.5
2. Japanujo ..	900	835	92.8
3. Urugvajo ..	250	215	86.0
4. Maroko ..	500	425	85.0
5. Sud-Afriko ..	300	255	85.0
6. Svislando ..	1400	1180	84.3
7. Germanujo ..	3200	2635	82.3
8. Danlando ..	2700	2185	80.9
9. Belgujo ..	2300	1844	80.2
10. Francujo ..	5500	4127	75.0
11. Aŭstralio ..	850	630	74.1
12. Finnlando ..	2600	1870	71.9
13. Hispanujo ..	1300	925	71.2
14. Nederlando ..	4800	3415	71.1
15. Usono ..	2500	1775	71.0
16. Kanado ..	250	175	70.0
17. Norvegujo ..	1700	1170	68.8
18. Britujo ..	12000	8111	67.6
19. Italujo ..	2200	1465	66.6
20. Portugalujo ..	800	500	62.5
21. Svedlando ..	5200	3240	62.3
22. Kubo ..	250	145	58.0
23. Islando ..	400	230	57.5
24. Nov-Zelando ..	800	455	56.9
25. Aŭstrujo ..	1000	540	54.0
26. Brazilo ..	4500	1909	42.4
27. Irlando ..	250	80	32.0

ekz. pri ‘logika tempo’, dufoje)p. 12, 1.29 kaj p. 25, 1.9); **ĉirkaŭ** anstataŭ *apud* (p. 28, 1.6) kaj **rajtis** anstataŭ *estis permesata* (p. 41, 1.18). Kaj ĉu la viroj vere enportis **bufedon** en la domon? (p. 9, 1.17).

Tri neologismojn la aŭtoro listigas, el kiuj mi dubas pri la neceso de **bunta** (*multkolora*); kaj unu li uzas sed ne listigas, nome **reklamacii** (*respostuli*?).

Sed estus kaj malĝentile kaj nedankeme tro emfazi tiajn makuletojn. La libreto estas belstila, belaspekta, ĝuinda kaj ĉiel taŭga ‘postkursa leĝaĵo’.

J. H. Sullivan.

Niaj Kunlaborantoj

Joel Vilkki, Ĉefdelegito de U.E.A. en Finnlando

VERŜAJNE neniu alia homo en la Esperanto-movado, okupinte preskaŭ neniun oficialan postenon, tamen tiel aktivis en la movado, kaj havis tiom da influo, kiom Joel Vilkki. Loĝinte grandan parton de sia profesia vivo en la kamparo, S-ro Vilkki ne ĉiam povis oportune partopreni en la vigla vivo de la grupoj. Lia modela organizado de la ĉefdelegita laboro tamen alportis bonegajn rezultojn kaj aparte en la administracio malkovris neordinaran talenton je detala ordigo de faktoj. Precipe en la Centra Oficejo oni scias taksu tiel bone plenumitan laboron.

Joel Vilkki kontaktis Esperanton per ŝlosilo kiam li estis 9-jara sed bedaŭrinde neniu plenaĝulo apudestis por doni al li gvidon kaj helpon. Ne ĝis 1917 — kiam grava malsano enlitigis lin dum 7 semajnoj — li denove interesiĝis pri la lingvo, sed ĉi-foje li tute sin donis al ĝi, ravite de la interna ideo de Zamenhof. Kiam li aŭtune vizitis la ĉefurban klubon “La Polusstelo” li povis jam bone esprimi sin en la lingvo.

Profesie Joel Vilkki estas instruisto de matematiko kaj kemio. Dum la pligranda parto de sia profesia vivo li deĵoris ankaŭ kiel rektoro de liceo, kaj de 1929 laboras en geknaba liceo de Somero. En la universitato de Turku (post tiu de Helsinko) li studis — 1922–1924 — kaj akiris diplomon de Candidatus Philosophiae kaj titolon Magister Philosophiae. Liaj ĉefaj interesoj nun estas Esperanto, Intersteno kaj, en somero, ĝardenkultivado en sia ĝardeno kun interalie 250 fruktaroj.



La tuta familio Vilkki estas Esperantista, kaj tio estas atentinda fakto. Ne estas bagatelo havi edzinon kaj 5 gefilojn inter 25 kaj 9 jaroj parolantajn Esperanton! Estus interese scii, ĉu tio estas rekordo en la movado!

La kontribuo de S-ro Vilkki sur kampo pedagogia estas grava. De 1947 ĝis 1949 la lingvo estis en la temaro de la liceo, sed libervola temo. De la aŭtuno 1949 Esperanto estas deviga temo en tiu liceo (vidu Jarlibron P-ton II, 1951 por detaloj) kaj oni eĉ dungis eksterlandan instruistinon por la tasko instrui la lingvon!

Kvieta, nesintruda homo, kapabla kaj fidinda, S-ro Joel Vilkki devigas la respekton kaj admiron de ĉiuj, kiuj lin konas. Al li direktigu la gratulo kaj danko de la movado!

M.S.

S-ino M. C. Major : (*el ŝia taglibro*)

Arĝentjublea festo en Finnlando

UNU tagon du virinoj subite aperis en la kuirejo je la 8-a horo matene kaj restis tie dum la tuta tago ĝis la 9-a vespere. Por komenci ili hejtis la grandegan fornon dum du horoj. Por tion fari ili uzis longajn lignoŝtipojn, kiujn ili kuŝigis laŭlonge kaj ekbruligis en la forno mem. Fine, kiam restis nur kelkaj cindroj ili elskrapis tiujn kaj enŝovis multajn panojn diversspecajn.

Mi konstatis la eniron de dekoj kaj dekoj da panoj, zingibraj kukoj en formo de koro aŭ stelo, kaj la kutimaj kafpanoj en formo de plektaĵo. Krome eniris multegaj biskvitoj, kiel S-literoj aŭ malgrandaj kronoj kaj ankaŭ kuketoj konsistantaj el kulerpleno da bona pasto (poste kunigotaj duope per marmelado kaj baptotaj *kulerkukoj*) kaj grandaj rondaj *spongokukoj* (kiuj poste ricevis en supreniĝantaj tavoloj marmeladon, batitan kremon kaj konservitajn pirojn). Tiu laboro daŭris dum kvar tagoj!

Mi kompreneble sciis, kio okazas, ĉar mi ĵus ricevis invitkarton subskribitan de Suoma kaj Joel Vilkki, kies malmultaj vortoj sciigis min pri festa kuniĝo en ilia hejmo. Temis pri la 25-a datreveno de la edziĝo.

Evidente S-ino Vilkki antaŭĝojis pri la akcepto de 100 gastoj, sed la edzo prezentis pasivan kontraŭstaron kaj murmuris vortojn pri la fakto, ke antaŭ 25 jaroj oni ne faris grandan feston, do kial komenci nun? Sed volo de virino estas volo de Dio kaj la preparado daŭris.

Je la mateno de la granda tago ankoraŭ 3 virinoj aperis en la kuirejo

portantaj nigrajn robojn kaj blankajn antaŭtukojn. Grandaj korboj, plenaj de teleroj kaj tasoj, liveriĝis ĉe la domo. Inter tia kunpuŝiĝado mi sentis min superflua, kaj do malaperis kun la hundo por fari promenadon. Mi revenis ĉirkaŭ la tagmezo.

Iom post iom alvenis familianoj kaj geamikoj. Estis bone por mi, ke ili ne alvenis ĉiuj samtempe ĉar tiel ni povis ekkoniĝi pli facile. Ĉe la tagmanĝo mi sidis apud Esperantistoj, geedzoj el Paimio. Dum la lastaj tagoj ni ne ricevis deserton parte pro manko de spaco kaj tempo en la kuirejo kaj parte pro tio, ke ni volis rezervi niajn fortojn por la "granda tago". Kaj jen ĝi alvenis kaj ni rajtis libere ataki. Unue ni atakis diversajn antaŭmanĝojn, ĉiam kun pecoj de diversaj panoj kaj multe da butero. Poste ni ricevis viandan pasteĉon kaj klaran supon (laŭ tiu vico). Apude ni trinkis hejmemfaritan bieron nomitan *Kalja*, sed mi rapidas aldoni, ke ĝi estas farita el sekalo kaj enhavas nur 1-2% da alkoholo.

Floroj abunde alvenis: ciklamoj, rozoj, dianto, kaj ankaŭ kelkaj arĝentaj objektoj. Oni kuŝigis ilin sur tabloj kaj lasis apud ili la karton de la doninto. En la nomo de foraj geamikoj kaj gesamideanoj mi transdonis al la gesinjoroj Zamenhofan medalon kaj silkan ŝalon (kompreneble surhavantan verdan stelon).

Je la 5-a horo la lokaj gastoj komencis alveni kaj ĉiu ricevis varman kafon ĉe alveno. Ili sidis en diversaj ĉambroj kaj kune babilis. Sekvis muzika programo, kiun Eeva Saikkala kaj mi komencis per niaj du 4-manaj muzikpecoj ĉe la fortepiano. Sekvis

interesaj kaj belaj kantoj de la familio Parko kaj geamikoj. Prezidanto de la Lerneja Estraro leviĝis kaj faris salutparolon. Denove kantoj kaj muzikaĵoj. La parolarto estis montrita de S-ro Horila per finnaj poemoj, kaj mi ege bedaŭris mian nekomprenon de la belsona finna lingvo.

Proksimume je la 9-a horo ekaperis diversaj pladoj sur la granda tablo en la bufedo: malvarma legoma salato kun kremsaŭco, freŝa fromaĝo, hepata kolbaso, porkaĵo, sardeloj, k.t.p.—ĉiuj manĝataj kun varmaj terpomoj kaj laŭvole buterpano. Poste je mallongaj intervaloj, alvenis ankaŭ varmaj pladoj: truto kun terpomoj, renoj kun spinaco, viandaj pasteĉoj kaj klara supo. Ĉion oni prenas dum malrapida irado ĉirkaŭ la tablo kaj komence mi bedaŭris la atendan

staradon, sed poste mi konstatis la avantaĝon kiam oni povas preni ĝustetion, kio plej plaĉas. La teleron oni portas al flanka tablo en alia ĉambro kaj oni manĝas kaj babilas kun la najbaroj. La saman teleron oni zorge konservas ĉar novaj manĝaĵoj konstante alvenas...

Je la noktomezo la homoj komencis foriri kaj la vorto *Näkemiin* (Ĝis revido) aŭdiĝis el ĉiuj flankoj. Necesis iom da tempo por trovi la superŝuojn de la gastoj kaj depreni la surtutojn de la pendigiloj, sed antaŭ la unua horo ili estis for kaj restis nur la gastoj, kiuj tranoktos.

Tio estis por mi grandioza kaj interesa festo.

(S-ino Major, konata samideanino angla, pasintjare instruis Esperanton kaj angla-lingvon en Somero, Finnlando. Poste ŝi instruis Esperanton Ĉe-metode en Norvegujo.)

daŭrigo (de p. 149)

geedzoj estos riĉaj, sed se neĝas, la paro havos multe da larmoj. Dum veturo al la registrejo kaj preĝejo la fianĉino ne turnu la kapon por rigardi malantaŭen ĉar tio signifas, ke ŝi baldaŭ rigardos aliajn virojn, do ŝi ne estos fidela edzino. Kiam la geedzoj forlasas la registrejon aŭ la preĝejon la geamikoj baras la vojon, kaj la edzo devas "elaĉeti" la liberan vojon per moneroj. Dum la geedza festeno la novaj geedzoj devis manĝi de sama telero aŭ preni supon el sama pelvo. Tio simbolis la akcepton de la devo kune porti la ŝarĝon de la vivo. Je la 24-a horo oni disŝiris la edziniĝan vualon kaj ĉiuj provis akiri pecon de ĝi. Tiam oni dancis ĉirkaŭ la florkrono, kiun ricevis la fraŭlino, kies edziniĝo plej baldaŭ okazos. Senvestigante sin, la novedzino

provas meti siajn vestojn sur tiujn de la edzo por ke ŝi akiru la potencon super li dum la geedza vivo. Du gefratoj ne geedziĝu en la sama jaro. Tio signifas, ke la dua paro forrabas la feliĉon de la unua. Je duobla geedziĝo tamen tio ne validas.

La morto: La morto sin anoncas per la kriado de kornikoj kaj noktuo kaj per la plorego de hundo. Se homo mortas oni tuj malfermas fenestron por ke lia animo libere ĉieleniru. Se oni ne fermas la okulojn de la mortinto, aŭ se pluvas en la tombon, baldaŭ sekvos alia. Oni ankoraŭ donas al la mortinto "vojaĝmonon" t.e. paran nombron da moneroj, tabakon kaj pipon. Post forporto de la kadavro iu restu en la domo por fermi la pordon (por ke la mortinto ne revenu!).

Josef Steppan :

Popolaj moroj kaj kutimoj de Turingio

EĈ se ni hodiaŭaj homoj inklinas ridi pri la kutimoj, moroj kaj zorgoj de niaj antaŭuloj, tamen estas interese ekzameni kaj kolekti la informojn, kiel faras mia kolego Freyer pri la kutimoj de la loĝantaro en Kahla kaj la ĉirkaŭaĵo. Per ili eblas ekscii iom pri la vivo kaj pri la kultura historio de niaj prauloj. Iujn el tiuj praktikoj kaj kredoj mi listigis en kategorioj.

Gravedeco : Oni tre admonis gravedulinojn ne ektimi por ke la naskoto ne havu denaskajn haŭtsignojn, makulojn kaj simile. Cetere, ŝi ne frandu kaj ne ŝtelu, alie la infano havos similajn inklinojn. Tia virino nepre ne transgrimpu barilon de ĝardeno se ŝi ne deziras danĝeran akuŝiĝon. Akompani enterigan procesion certigus al la infano la vizaĝkoloron de mortinto. Kelkajn tagojn antaŭ la naskiĝo la gefratoj metas sukeron sur la fenestrobreton kaj petas la cikonion alporti fraton (aŭ fratinon). Al ili oni rakontas, ke la cikonio alportas la infaneton el apuda lago kaj ĵetas ĝin en la kamenon. La cikonio poste mordas la kruron de juna patrino tiel, ke ŝi devas kuŝi en la lito. .

La nasko : Dimanĉe naskitaj infanoj nepre ĝuos feliĉon. La najbaroj kaj konatoj gratulas kaj alportas "akuŝlitan supon" kiu tamen ne ĉiam estas supo, sed aliaj donacoj, nutraĵoj, infantolaĵoj k.s. La juna patro donas al siaj amikoj kaj kolegoj bieron, "purigan bieron" pro la fulgo rezultanta el la kamentuba vojaĝo de la infano ! Dum ses semajnoj post nasko la patrino ne iru en kelon !

La unua promeno estu al la preĝejo.

La bapto : La infano ne estu montrata surstrate ĝis post la baptiĝo. Dum la unua jaro oni ne portu la infanon en kelon, por ke ĝi ne dum la tuta vivo vidu la internon de malliberejo. La akuŝistino portas la infanon al la bapto. Se ĝi ekkrias dum la ceremonio, tio estas voko al venontaj gefratoj ! La baptogepatroj portas siajn donacojn al la preĝejo kaj poste al la hejmo de la infano, kie ili metas ilin sub la kapon de la etulo dirante : "Ĉi tie mi donas al vi la vian, ĉiu alia ricevu la sian." Ili devas gustumi je ĉiuj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj por ke la infano ĝuu dum la tuta vivo ĉiujn manĝaĵojn.

Lernejo : Kiam la infano ekiras al la lernejo la baptogepatroj donacas la unuajn instruilojn. La infano ricevas grandan papersakon plenan de sukeraĵoj kaj ĉokoladoj (nuntempe ne eble).

La edziĝfestoj : Dum la antaŭedziĝa vespero la amikoj tre bruegas per diversaj porcelanaĵoj kaj vitraĵoj ĉar disrompaĵoj (precipe de porcelanaĵoj) signifas feliĉon. La gefianĉoj devas kunbalai la disrompaĵojn kaj porti ilin sur la rubejon. La amikoj de la fianĉo metas apud la pordo de la edziĝfesta domo 2 aŭ 4 piceojn. Poste ili ricevas alkoholaĵojn. La patro de la fianĉino devas financi la feston. La fianĉo aĉetas al la fianĉino nur la edziĝan veston kaj bukedon. La geedziĝa veturilo nepre ne veturu hejmen per la sama vojo kiel la aliro. Se pluvas sur la edzinan florkronon la

daŭrigo (sur p. 148)



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Pri Aktualaj Problemoj

D-ro Privat skribas en sia recenzo pri *Aktualaj Problemoj*, ke li ofte sopiris al “mediado” kaj “arbitrado” anstataŭ “mediacio” kaj “arbitracio”. Tia uzo tamen ne konformus al la oficialaj signifoj de *medio* kaj *arbitra*. *Arbitri* signifas “decidi senkontrole” sed *arbitracii* signifas “juĝi inter du disputantoj, kiuj konsente vin elektis por tio”. *Medio* estas “fizika ĉirkaŭaĵo” kaj estas bone uzebla ankaŭ verbe: “La plebo medias en mizero”. (*Mediigi* povas doni la sencon, kiun iom peze oni esprimas per figura uzo de “alklimatiĝi”.) Do “arbitrado” kaj “mediado” ne portus la signifojn, kiujn D-ro Privat deziras atribui al ili.

Pri la valoro de *federala* apud *federacia* mi ne estas kompetenta juĝi. Mi atentigas nur, ke D-ro Lapenna difinas sur p. 41 la apartan signifon, kiun li donas al “federala”, sekve li plene rajtis ĝin uzi tra la libro en la nomita signifo.

R. Rossetti, Anglujo.

Kaj—kaj—ambaŭ

Mi surprizate legis, en *Esperanto* de Februaro 1952, paĝon 49, ke laŭ D-ro Privat multaj el ni skribus “ambaŭ bona kaj prava”, kaj ke ŝajne li dubas pri la malpravenco de la esprimo.

Mi kredas, ke bonaj instruistoj kaj lernolibroj klarigas, ke “kaj

kaj” estas la sola ĝusta esprimo, kaj ke “ambaŭ kaj” estas eraro praktikata nur de ne sufiĉe instruitaj anglalingvanoj.

Ke **ambaŭ** estas pronomo kaj ne konjunkcio montras la franca kaj germana tradukoj en *Universala Vortaro* (l'un et l'autre ; beide). Kaj aŭtoritata konfirmo troviĝas en *Lingvaj Respondoj* (Plena Kolekto, paĝo 64), kie Zamenhof mem diras jene :

“ ‘Ambaŭ’ signifas : ‘ĉiuj du’, t.e., ĝi estas uzata anstataŭ ‘ĉiuj’, kiam ni parolas nur pri du personoj aŭ objektoj. Tial la konjunkcian uzadon de ‘ambaŭ’ en la frazo ‘ni loĝas en Londono ambaŭ en somero kaj en vintro’ mi trovas tute ne aprobinda (estas konsilinde diri : *kiel* en somero, *tiel ankaŭ* en vintro’, aŭ ‘ne nur en somero, sed ankaŭ en vintro’).”

Mi plue rimarkas, en la sama kajero de *Esperanto*, paĝon 34, la esprimon “La Katedralo **ĉe** Hereford”, kaj simile, paĝon 36, “**ĉe** Nürnberg”. Ankaŭ ĉi-tiu angleca misuzo ŝokas min : la katedralo estas en, ne ĉe Hereford. Klasika Zamenhofa paralelo estas la titolo de artikolo en *Fundamenta Krestomatio*, “La Sunhorloĝo en Dijon”.

Gratulon pri la ĝenerala alta nivelo de *Esperanto* !

C. M. Houghton, Anglujo.

Esperanto en la turismo

La junulgasteja movado, la plibonigitaj trafikrimedoj, ĉio post la milito donis novan impulson al internacia vojaĝado. Multaj el la homoj komprenas fremdajn lingvojn sed granda parto fidus je la propra lingvo. En iuj lokoj la angla estas multe komprenata, en aliaj la germana, kaj en ankoraŭ aliaj la franca, sed estus interese scii fakte kiom el la turistoj kontentige komprenigas sin dum siaj vojaĝoj. Interesa estus statistiko pri tio, kiom el la anoj de junulgastejoj kapablas komprenigi sin eksterlande, kaj kiom el la domestroj de la movado regas lingvojn, kaj kiujn !

Ĉiuj Esperantistoj scias, ke help-lingvo solvus multajn problemojn por la turisto kaj estas certe, ke sen la lingva problemo la nombro de turistoj kreskus. Estas tial bedaŭrinde kaj surprize, ke la malgrandaj landoj—Skandinavio, la Beneluksaj landoj k.s.—ne rekonas la esencan valoron de Esperanto kiel turisma lingvo. Apogo oficiala en tiuj landoj povus krei kondiĉojn por la praktika alpreno de Esperanto en aliaj lokoj. Esperantistoj povus uzi tiun starpunkton en sia propagando en la koncernaj landoj.

Kiel nova Esperantisto mi miras je la fakto, ke tiom da samideanoj ne portas stelon. Kiel oni povas rekonu Esperantiston se ne per la stelo? La Esperantistoj devus rekonu la praktikan valoron de reklamado.

*J. Stig Hansen,
Dana Trafikĉefo, Oslo.*

Libro bezonata

Kiam, ho kiam, la francaj samideanoj liveros al la Esperantistaro tradukon de tiu bonega kaj fama

verko, *Tartarin de Tarascon*? Mia-opinie, la franca literaturo nesufiĉe aperis en verda vesto kaj *Tartarin* certe valoras esperantigon.

William P. Vathis, Hong Kong.

El Jugoslavujo . . .

Ĉiam mi sopiras ricevi la gazeton, kiun mi senlace tuj tralegas kaj mi sentas min refreŝigita por unu monato. Ankoraŭfoje prenu de mi dank-esprimon . . .

Brezovšek Bogo.

. . . kaj el Japanujo

Per via letero, mi sciigis ke la Esperanta Klubo de Karlskoga bonkore pagis por mi la kotizon al nia Asocio. Mi estis tute kortuŝita, kaj ankoraŭ nun. Mi sendis dankleteron al la Klubo. Mia danko al la Klubo kaj vi ĉiumomente profundigos mian esperon kaj volon. Kiel vi supozus, ni japanoj vivas nun sub multe da ekonomiaj malfacilaĵoj. Sekve mi precipe sentas tiel . . .

Noboru Hayakawa.

★ Du el la dankesprimoj ricevitaĵ pro adoptado. Restas multaj aliaj neadoptitoj, kiuj esperas pri tia helpo.

Io pri Nenio

Iu poeto en sia sio
Eltrovis ion "*En mia mio*".
Amiko kaj mi en nia nio
Trovas lin lerta en lia lio.
Sed ĉu vi ne trovas en via vio,
Kaj la edzino en ŝia ŝio,
Ankaŭ infanoj en ilia ilio,
Ke la tuta serio en ĝia ĝio
Estas vantaĵo de iu kranio
Kaj ne komprenebla en la poezio?

D. H. H. Searle, Anglujo.

D-ro P. Kempeneers :

Pri Aŭto-haltigo

DEZIRO pri aventuro, bezono pri “io alia” ne plu estas tiel fortaj kiel en la jaroj tuj post la milito; tamen ĉiujare dekoj da neplenaĝaj junuloj malaperas el la gepatra hejmo por iri aliloken renkonte al nedifinita estonteco. La ĉagreno de la gepatroj estas ĝenerale nedireble granda, kiam ili konstatas ke ili ne multon komprenis de siaj infanoj, kaj ne povis imagi al si, ke ilia infano cerbumis tiajn planojn.

Vi kelkfoje aŭdas en la radio anoncon, ke junulo ne revenis al la hejmo. Ĉu vi jam pensis pri la dramo, kiu kuŝas malantaŭ tiu anonco, legita de la senpersona voĉo de la anoncanto?

Imagu al vi, ke via filo aŭ filino, dekkviĉ- aŭ dek ses-jara, iun vesperon ne revenas hejmen. Fariĝas malfrue, ankoraŭ pli malfrue, kaj neniu komprenas de kie li aŭ ŝi povas reveni. Oni ne volonte iras tuj al la polico. La vespero ankoraŭ ne finiĝis; tamen nepre venos la momento, kiam patro aŭ patrino devos ŝlosi la stratpordon, nesciante, kie estas la filo aŭ la filino.

Polickomisaro Kallenborn priparolis tiun temon en intervjuo kiu aperis en *Elseviers Weekblad* kaj li insistis, ke oni revenigu hejmen, kiel eble plej rapide, la retrovitajn infanojn. En Internacia Polica Konferenco ĵus okazinta oni priparolis

la grandajn danĝerojn, kiuj minacas forkurintajn infanojn, speciale en la eksterlando, kiel ili povas esti forlogataj al diversaj malbonoj, kaj alveni en ĉirkaŭaĵon en kiu ili estas tute fremdaj. Por knabinoj la sekvoj povas fariĝi vere katastrofaj, se ili troviĝas sur la glitanta deklivo kaj malsupreniras en malhelan ĉirkaŭaĵon de granda urbo.

Komisaro Kallenborn rakontas pri junulo malaperinta el Scheveningen, kiun oni retrovis en Kostariko, kie li sekvis forlogantan homon.

Kaj vi verŝajne memoras pri aventuro iom simila, kiu aperis antaŭ kelkaj monatoj en nia gazetaro. Temis pri belga junulo, kiun oni retrovis en Francujo post strangaj aventuroj. Estas vere mirige, kiel facilanime estroj de familioj, cetere tre konvenaj, donas permeson al siaj infanoj veturi eksterlanden per “aŭto-haltigo”. Ili tiel sidiĝas en aŭtomobiloj de tute nekonataj personoj, kun ĉiuj danĝeroj ligataj al tiu fakto.

Ĉu tiaj gepatroj kelkfoje demandas al si, kien alvenas iliaj infanoj? Speciale por la knabinoj tiu “aŭto-haltigo” estas tre danĝera. Tiuj gepatroj, kiuj tiel facile sendas siajn infanojn eksterlanden ĉar—kiel oni ofte aŭdas—ili povas vidi tiom por malmulte da mono, devus pripensi, ke la kalkulo por perdita infana vivo povus esti iam terure multekosta.

ESPERANTO — INSTRUISTOJ !

Sveda Esperanto-Federacio deziras por aŭtunaj kursoj eksterlandajn E-instruistojn, kiuj sendu informojn rekte al la prez. Jan Strönne, Amiralsgatan 36, MALMÖ, Svedujo

Mary Stuttard :

Kelkaj observoj pri Oslo

KIAM mi eksciis, ke mi venos al Oslo, mi tuj pensis pri ĉio, kion mi legis pri Norvegujo en mia junaĝo. Mi pensis pri la malvarmo, pri lignaj domoj, kaj mi imagis, ke la norvegoj estas ĉiam vestitaj per peltoj kaj feloj. Mi fakte imagis Norvegujon kiel vastan kamparan aŭ arbaran terenon, sed tute ne imagis grandajn urbojn kaj metropolojn.

Poste, kompreneble, mi sciis, ke troviĝas urboj sed mi neniam bildigis al mi la realon, kio estas Oslo. Mi alvenis en la ĉefurbo malfrue nokte kaj la unua impresio estis grandaj domoj kaj multaj koloraj lumoj. En la taglumo mi poste trovis viglan vivon sur la stratoj kaj rimarkis la elegantajn homojn—kaj virojn kaj virinojn—kiuj rapidis tien kaj reen. Frapis min la fakto, ke la vizaĝoj estas nefremdaj (ne kiel, ekzemple, en Bavarujo, kiun mi ĵus forlasis) sed

preskaŭ kiel anglaj vizaĝoj—kun tamen unu granda diferenco. La norvegoj estas tre seriozmienaj.

Por mi frapas la eksterordinara ĝentileco kaj helpemo de la norvegoj. Neniam antaŭe mi vidis konduktorojn deiri de la tramo por helpi al sinjorinoj malsupreniri kaj eniri ; sed tio estas normala afero en Oslo.

Mi tre admiras la belecon de la norvegaj virinoj, precipe la kvaliton de la haŭto. Mi opinias, ke tio devas esti rezulto de la treege bonkvalita akvo ĉi tie. Mi trovas ĝin tre “mola” kaj bano estas por mi vera ĝuo. La akvo kvazaŭ karesas la haŭton ; kaj kiom da ŝaŭmo !

Unu el la plej grandaj kontrastoj kun la vivo en Anglujo—mia hejmlando—estas ĉe la servado de manĝoj. La “buterpano” estas nekonata ĉe ni. La angloj servas ĉiam sandviĉojn, kaj per tiu duobla pantranĉo rabas la tablon de koloro kaj formo. Servi




La mondfama skisaltejo Holmenkollen dum la Olimpiado 1952

unu pantranĉon kun ia ŝmiraĵo permesas al la mastrino uzi sian genion ĉe la servado, kaj mi ĉiufoje estas ravita je la arto per kiu oni beligas la pladojn. Kia diverso de koloro sur la teleroj! Buterpanoj kun “Itala salado”, ŝinko, “salami”-kolbaso, kaprinalakta fromaĝo—tiu tute speciala frandaĵo norvega, bruna fromaĝo kun postgusto de enskatola lakto de Nestlé!—kaj mi ne scias kiom da aliaj frandaĵoj spicaj, salaj kaj marinaj incitas la apetiton jam je la unua rigardo! Ankaŭ ĉe la tablo montriĝas la ĝentileco de la norvegoj. Eksterlandanoj iafoje salutas antaŭ la manĝo per “Bonan apetiton!”, sed mi neniam antaŭe aŭdis la ĉarman “Dankon pro la manĝo” direktitan al la mastrino. Kaj kie aliloke oni je foriro dankas “pro hodiaŭ”, kaj je nova renkontiĝo dankas “pro lasta fojo”? Tio igas nin flegmajn anglojn senti nin barbaroj.

Piedirante tra la stratoj vespere oni vidas transformiĝon de la vivo en la ĉefurbo. Mi jam menciis la iom severajn trajtojn de la norvegoj, sed mi opinias, ke tio estas nur masko por

la romantikeco en la koro. Tiu romantikeco montriĝas vespere. Ĉiuj hejmoj estas prilumitaj per multaj lumoj; sed ne per la brilaj blankaj lumoj konataj en Anglujo. Ili estas diskretaj lumoj, en anguloj de la ĉambroj kaj ili ne ĵetas fortajn ombrojn. Regas atmosfero de intimo. En tia medio oni ne povus ne esti romantika.

Kiam mi unue venis al ĉi tiu lando kaj vidis la infanojn ili ŝajnis al mi iom krude vestitaj. Tio estis en septembro; sed kiam venis la malvarmo mi komprenis la prudenton de tiuj dikaj lanaj vestoj kaj longaj ŝtrumpoj. Kiam venas la neĝo la infanoj estas videblaj je ilia plej bona faceto. Kontraste kun la blanka fono, iliaj helkoloraj vestoj kaj skarpoj brile elstaras. Kaj kiom rava bildo estas la sceno kun etuloj sur skioj! Eĉ la plej etaj infanoj apenaŭ marŝpovaj ŝajne naskiĝas kun la inklino al la skiado. Butikumi estis por mi ĉiam ĝojo pro la vigla infana vivo sur la stratoj, kaj mi havas la impreson, ke Norvegujo estas bona loko en kiu esti infano...



*Simbolo de
Norvegujo.*

*Digno,
forto,
gracio.*

Frans Carolina Ridwit :

Fabelo

Iam, kiam la homoj ankoraŭ parolis . . .

BAKA kaj Biki, la muspatrino kaj la ido, sidis ĝuste antaŭ la ronda eniro de sia kaveto. Kiel ĉiuvespere ili tie sidis kaj estis bone ; lume kaj varme. La varmo kaj la lumo—kaj krome la muziko !—invadis ĝin el kavego, en kiu loĝis homoj. Sole iam kaj iam ombro penetris la kaveton, kiam la piedegoj de unu el la homoj paŝis pretere.

La tutan tempon kiam la homoj ĉeestis, Baka kaj Biki eĉ ne unu fojon forlasis sian kaveton—la homoj estas ja tiel kruelaj—kaj ĝuis la lumon kaj la varmon, ne la muzikon, ĉar ofte ĝi duone frenezigis ilin kaj, en la granda kavego, ankaŭ la homojn, kiuj jen subite eksaltis sur siaj piedegoj ; tio ŝajnis tero-tremo, kiu ĉiufoje naŭzis la etan Biki.

Hodiaŭ vespere estas tre kviete en la granda homokavo kaj en la mallarĝa musokavo. Biki faras kion ŝi faras en ĉiuj kvietaj vesperoj : ŝi prenas la fabelo-libron el murofendo de la kaveto. Ĝi estas peza libro kun multaj bildoj kaj multaj rakontoj, verkitaj de la plej fama musopoeto Vilanazo.

Baka tuj rimarkas, ke ĉia brilo forestas en la perlokuloj de la eta Biki, kiu neniel ĝojegas kiel kutime, kiam la patrino pretas voĉlegi el la granda libro. Kontraŭe, falteto kuŝas inter la okuloj de Biki, kvazaŭ ĝi tre serioze pripensus aferojn, neniel rilatajn al fabeletoj.

Sed Biki tamen pripensas aferojn rilatajn al fabeletoj ĉar ĝuste kiam la patrino skrapas sian gorĝon por eklegi, ĝi abrupte diras per sia akra voĉeto :

“Panjo Baka, kial do la fabeletoj ĉiam komenciĝas : *Iam, kiam la homoj ankoraŭ parolis . . .* ? La homoj ankoraŭ ĉiam parolas, nur aŭskultu . . .”

Baka rikanas. Do, pri tio ŝia etulo cerbumadis.

“Aĥ, infano,” ŝi diras, “niaj fabeletoj tiel komenciĝas pro la sama motivo kial la homaj fabeletoj ĉiam komenciĝas : *Iam, kiam la bestoj ankoraŭ parolis . . .*”

Biki tre penetre rigardas.

“Ni ja ankoraŭ parolas, Panjo Baka . . .”

Baka serioze skuas la griziĝantan kapon.

“Ni, musoj, parolas kaj komprenas unu la alian, ni havas muso-lingvon . . . Sed la katoj, la hundoj aŭ la kokinoj parolas, sed ni ne komprenas ilin kaj ili ne nin . . . Ne plu estas besto-lingvo . . .”

La falteto inter la okuloj de Biki fariĝas pli neta. La musido nepre penas kompreni.

“Jes, Panjo Baka, do estis tempo kiam la muso parolis kun la kato kaj la kato kun la tigro . . . Kaj ĉu tiam la bestoj estis feliĉaj, kiel oni rakontas en la fabeletoj ?”

“Efektive, infano, tiam la bestoj estis feliĉaj . . . Tiam estis la paradiza tempo, la tempo de paco kaj beato, ĉiuj nutris sin per tio kion la granda edeno donis al ili . . . Ni petolis, ludis kaj babilis unu kun la alia, eĉ kun la homoj . . .”

La eta Biki malfermegas siajn okulojn.

“Ĉu ni babilis kun la homoj ?”

Baka kompate kaposkuas.

“Tiam estis nur unu lingvo por homo kaj besto,” ŝi mallaŭte respondas, “kaj iun tagon la serpento babilis kun unu el la homoj . . . Tio okazis sub pomujo, kies fruktoj, laŭ ordono de la granda Paradiz-estro, estis malpermesitaj kaj al la homo kaj al la besto . . . La serpento—la falsa monstro—konvinkis unu el la homoj ke ŝi manĝu pomon de la arbo kaj la unua homo persvadis la alian agi same . . . La granda Estro tiam tiel bolis de kolero ke li simple pelis homojn kaj bestojn el la paradizo sur la teron, kie ni nun loĝas . . .”

La oreletoj de Biki streĉe tremas.

“Kia estas la tero, mia trezoreto,” Baka sopiras, “vi ja mem spertas. Por vivi unu manĝas la alian . . . La tero ne estis milda kiel la paradizo kaj besto kaj homo rapide sentis ke en loko tiel rigora taŭgas nur forto kaj ruzo . . . La pli fortaj bestoj atakis la pli malfortajn kaj disŝiris ilin . . . Sed la ruzo de la homo submetis ĉiujn bestojn kaj li mortigis ilin per ŝtono, ligno, fajro, jes per ĉiuj aĵoj kiujn lia homa genio povis imagi . . . La tero fariĝis murdejo, teruraĵo . . . La mort-angoro vekis atakon kaj kaŭzis fuĝon . . . Ĉiu besto-speco timis aŭ avidis la alian, ekestis senĉesa mortigo aŭ mortiĝo . . . Ĉe renkonto la bestoj aŭdis unu de la alia nur du bruojn : krion de triumfo aŭ stertoron de morto . . . Ĉiu speco parolis sian propran lingvon, la bestoj ne plu “komprenis” unu la alian . . .”

Sur la ordinare velura korpeto de Biki nun hirtiĝas la haroj.

“Sed,” ĝi ĝemas, “la homoj, Panjo Baka . . . ? Ĉu estis homspecoj ?”

La respondo de Baka ne estas tuja. Nur malfacile ŝi kapablas tiel klarigi ĉion, ke la iometa cerbeto de Biki asimilas ĝin.

“Imagu, karuleto,” ŝi hezite diras, “la homa kazo estas plena stultaĵo. Ili ne konis specojn, sed ili faris ilin . . . Ĉe ili mortigo degeneris de neceso en volupton . . . Ilia genio tiel superis ĉion, ke ili fine inventis murdilojn tiel kruelajn, ke ĉasi la senrezistan beston tute ektedis ilin . . . Ili baldaŭ sopiris ion kio rezistos ilian kreskantan genion, kio faros la antaŭan ĉason batalo, kaj kio rezistas la genion de homo pli trafe ol la genio de alia homo . . . ? Tiam ili atakis unu la alian per siaj iloj kaj la rezulto estis la sama kiel koncerne la bestojn . . . Ili rapide dividiĝis en diversajn specojn, kiuj luktis unu kontraŭ la alian, evitis unu la alian, spionis unu la alian . . . Inter ili kelkaj blekas leone, unuj hunde, aliaj ŝafe, ceteraj muse . . . Ĉiu speco parolas propran lingvon, ili ne plu ‘komprenas’ unu la alian . . .”

Tre profunda, tre profunda nun estas la falto inter la okuloj de Biki. La musido nepre elcerbumas sian kapeton.

“Se la homoj estas tiomege geniaj, Panjo Baka,” ĝi fine mallaŭte diras, “ke ili faras inferajn ilojn, ĉu ili do ne povas fari lingvon por ‘kompreni’ unu la alian ?”

Konsterne Baka momenton levas la okulojn, Kiom eta la saĝo de ŝia aĵeto !

“Kompreneble, infano,” ŝi kompate diras. “Ili faras ankaŭ lingvon, kiun ĉiu povas kompreni—Esperanto ili nomas ĝin, mi kredas—la homoj povas ĉion fari, ili eĉ faris ilon per kiu ili povas neniigi la tutan mondon—atombombo ili nomis ĝin—sed ili simple ne akordiĝas pri tio, kion ili la unua uzu : la lingvon aŭ la bombon . . .”

Nun Biki ŝajnas ja erinacido, tiel la haroj rigidas sur ĝia tremanta korpeto.

Baka profunde kompatas sian kompatindan idon. Ŝi provas rideti kaj ŝi dolĉe konsolas, kiel patrino konsolas :

“Aĥ, koreto, la homoj estas tiel ruzaj . . . Malgraŭe ili eble uzos la unua la lingvon . . . Kaj tiam nia granda poeto Vilanazo rapide verkos aliajn fabeletojn . . . Nu, ĉu mi voĉlegu jenan ?”

Biki kapjesas kaj, vere, du dikaj larmoj samtempe fluas el ĝiaj perlukuletoj.

Baka delikate frapetas la malsekan nazeton de Biki. Kiel sentema la aĵeto ! Tiam Panjo Baka komencas laŭtlegi per sia hela voĉo :

“Iam, kiam la homoj ankoraŭ parolis . . .”

el la flandra tradukis kun permeso de la aŭtoro, D-ro T. Ken.

Julio Baghy :

Letero al Ĉarma Kolegino

*Vi flatas, Ĉarmulino. Ĉu ne honte
min trovi ĉiam juna kaj renkonte
aserti, ke la temp' forgesis pri mi,
ĉar eĉ nun june povas mi pririmi
dum taga helo—lunan amindumon,
dum noktomez'—la pompe brilan sunon,
kvar grizajn murojn, se venas okazo
prezenti turka tendo en oazo.*

*Jes, mia koro estas—deksesjara,
sed, ve ! la jaroj pli ol sesdek, kara.
Ne povas vivi hom' sen iluzio :
someron kreas vintre fantazio ;
se sort' muelas, korpo lacas, frostas,
la stulta kor' pri incendio tostas,
varmigas sin ĉe cindriĝinta fajro
dum revteksita danco de hetajro.*


*Sed, sciu, koro vane spitas, viglas,
se pordon de l' printempo vintro riglas :
la kor' jam lacas kaj mi plendas grumble,
ke strato krutas, kruroj troas stumble ;
mi damnas arĥitekton, lian saĝon,
ĉar li inventis ŝtupon kaj etaĝon
kaj tamen, tre ridinde, dum vi flatas,
ĉi vanta, stulta kor' pli vikle batas.*

*Perpense tuj sub la balkon' mi staras
eĉ ne sciante—verve mi gitaras ;
sur kordoj vibras kanto melodia,
vi supre rave revas, ho, Julia
sed vanas vervo, ĵuro, sprito, logo,
min via edzo, sperta astrologo,
per frazo vundas, akra kiel sabro :
“Aŭskultu, sube blekas la—*

VIRKAPRO !”

*Ĉar idilion trafis jen fiasko,
foriri ŝtele restas mia tasko,
Jes, ĝuste justa puno—mi murmuras—
se avo kiel nepo trubaduras.
Jam vanas smirgi ruston de liuto,
se mankas la juneco : la atuto
Mi ŝatas, se vi koron tuŝas, sondos,
sed, Ĉarmulin', ne flatu, ĉar mi hontos !*

* Virkapro estas aludo pri la zodiaka signo de Januaro, en kiu monato naskiĝis Julio Baghy.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 298m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala C.d., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.30–17.50	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 233m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
endredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Programo Roma : 9.V. Komento pri *Infero* de Dante ; 14.V. La itala komponisto, Riccardo Zandonai ; 16.V. Itala literaturo ; 21.V. Du germanaj fabeloj ; 23.V. *Infero* ; 28.V. por geknaboj, *Pinokjo* ; 30.V. La parolarto (Prof. Musella).

AŬSKULTU KAJ DANKESPRIMU AL LA STACIO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 238.

4-an de Aprilo 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	3241	3046
Individuaj Membroj		
MJ	596	576
MA	3763	3058
MS	248	385
Patronoj ..	16	8
DM	211	256
HM	58	57
	— 4892 —	— 4340 —
	8133	7386

DELEGITOJ

Aŭstralio

Mullewa. D : Vakas.

Belujo

Liège. D : J. Soyeur, Rue du Chêne, 91, Seraing. Tel : 34.08.94.

Britujo

Slough. D : Vakas.

Danujo

Odense. D kaj FD (Komerco) : Vakas.

Francujo

Harbonnières (Somme). D : G. Lemaire, Rue Raoul Defruit. Tel : 0.20.

Lourdes (Hautes-Pyrénées). D : S-ino M. le Bondidier, Chateau-Fort. Tel : 204.
FD (Folkloro) : La D.

Oyonnax (Ain). D : P. Coulot, 18 Avenue Jean Jaurès.

Germanujo

Mittweida. D: H. Löffler, (10b) Mitweida/Sa., Theaterstrasse 1. Tel : 2163.
FD (Filmaferoj) : La D.

München (Bayern). FD (Katolikismo) : L. Thalmaier, (13b) Gräfelng bei München, Bahnhofstrasse 18. Tel : 89274.

Hispanujo

Cheste (Valencia). D : V. Tarin Tarin, Strato Méndez Nunez 4.

Madrid. FD (Arkitekturo) : A. Hernandez Alvarez, Calle Santiago 2—II.

FD (Farmacio) : R. Manchado, Melendez Valdes 55. Tel : 248771.

FD (Juro) : G. Flores Martin, Ruiz 20. Tel : 24-38-43.

FD (Naturismo) : L. Santamarina Pedrayo, Ruiz Palacios 13 (Tetuán). Tel : 33-78-45.

Indonezio

Djakarta (Java). D : S-ino Ch. S. Dt. Toemenggoeng, Djalan Serang 8. Tel : 3303.

Japanujo

Sendai. D : S. Kikazaŭa, Obotekemae 18.

Jugoslavujo

Zagreb. FD (Kemio) : Vakas.

Kanariaj Insuloj

Santa Cruz de Tenerife. D : Vakas.

Maroko

Ouezzane. D : Vakas.

Nederlando

Den Burg (Texel). D : Vakas.

Rodezio (Suda)

Umtali. D : R. Harding, 22 Bridgebank Flats.

Svedujo

Skövde. FD (Kolorigado) : L. Westman, Granskagatan 1.C.

Ulricehamn. FD (Instruado) : Vakas.

Upsala. VD : R. Ahlqvist, Gôtgatan 11 m.b.
FD (Domkonstruado) : W. Sedendahl, Järnbrogatan 56 A. Tel : 36691.

Turkujo

Ankara. D : H. C. Günalp, Küçük Bahçeli Evler, 56 S. No. 10. Tel : 31267.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952.

363. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo

364. Phillipe, S-ro H., Arras, Francujo

365. Stuit, S-ro S., Arras, Francujo

366. Vincent, F-ino J., Lourdes, Francujo

367. Hellesø, S-ro G., Bergen, Norvegujo

368. Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo

369. Costa, S-ro L. J., Santos, Brazilo

370. da Costa, S-ro F. F., Rio de Janeiro, Brazilo

371. Fernandes, D-ro A. G., Areia Branca, Brazilo
 372. Neves, S-ro E. D., Rio de Janeiro, Brazilo
 373. Piauhi, D-ro J. N., Rio de Janeiro, Brazilo
 374. Poledna, S-ro C., São Paulo, Brazilo
 375. Juruena, F-ino C. A. Z., Rio de Janeiro, Brazilo
 376. Jacobi, S-ino E. A., Johannesburg, Sudafriko
 377. Glückher, S-ro W., Zürich, Svislando
 378. Nii, S-ino A., Toronto, Kanado
 379. Carrfors, S-ino S., Bromma, Svedujo
 380. Lieber, S-ino D., Ain Harrouda, Maroko
 381. Montserrat, S-ro F., Barcelona, Hispanujo
 382. Pueyo, S-ro D., Barcelona, Hispanujo
 383. Llinás, S-ro A., La Laguna, Kanariaj Insuloj
 384. Hug, S-ro R., Casablanca, Maroko
 385. Eldon, S-ro H. B., Southport, Anglujo
 386. Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando
 387. Unchitti, S-ro C. L., Bangkok, Thailando
 388. Clark, S-ro B., Leigh, Nov-Zelando
 389. Breeze, F-ino O., Wellington, Nov-Zelando
 390. Eichholz, S-ro R., Göttingen, Germanujo
 391. Ullrich, S-ro W., Wien, Aŭstrujo
 392. Gayfer, S-ro W. T., Cleethorpes, Anglujo
 393. Spence, D-ro D. B., Watford, Anglujo
 394. Reh, S-ro G., Bamberg, Germanujo
 395. Link, S-ro K., Heidelberg, Germanujo
 396. Roff, Pastro T. W., Deal, Anglujo

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Newland. Al Ges. R. A. Newland (U.E.A. Del. en Watford—28 Bushey Grove Road, Bushey, Watford, Herts., Anglujo) filino Alison Jane Fraser, je 1 aprilo 1952.

Gefianĉiĝo

Luez-Ollivaud. S-ro Daniel Luez, D. de U.E.A. en Laon, Francujo, kun F-ino Annick Ollivaud el Nantes, ankaŭ samideanino, je 14 aprilo 1952.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Catterall, A., en Bolton, Anglujo, je 5 marto 1952, 83-jara.

Davis, Robert L., en Highland Park, Usono, je 16 decembro 1951, 73-jara.

Gillett, S-ino M. C., en Banbury, Anglujo, je 10 aprilo 1952, 85-jara. Dumviva Membro de UEA, preskaŭ ĉiujare Patrono, kaj dum pli ol 25 jaroj UEA Delegito, ŝi multege helpis al la movado brita kaj internacia.

Jervis, Reginald Frank, U.E.A. D. en Slough, Anglujo, je 27 marto 1952, 46-jara. Fervora laboranto dum 25 jaroj.

Nurmio, Tauno, en Metsäkansa, Finnlando, je 14 aŭgusto 1951.

Raunio, K. A., en Hämeenlinna, Finnlando, je 25 oktobro 1951.

Schofield, H. O., en Nottingham, Anglujo, je 6 marto 1952, 79-jara. Grupsekretario antaŭ la unua mondmilito; alia pioniro malaperas el niaj rondoj.

Tiessen, Th., U.E.A. D. en Den Burg, Nederlando, je 7 marto 1952, 45-jara.

ESPERANTAJ TURISTAJ TAGOJ en GOTENBURGO, SVEDUJO

La Gotenburgaj esperantistoj alvokas partoprenantojn de la kongreso en Oslo kaj aliajn esperantistojn viziti la Esperantajn Turistajn Tagojn en Gotenburgo 31/7 kaj 1/8 1952. Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj en la urbo. Vizitoj en belaj lokoj, industrioj, muzeoj, amuzejoj. Loĝo kaj manĝo por malalta prezo. Nenia kongresa kotizo. Limdato por aliĝo 30.6.1952. Informojn petu de

Esperantaj Turistaj Tagoj, Skonertgatan 1, Göteborg Vr., Svedujo

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Tiam via lumo ekbrilos kiel matenruĝo, kaj via saniĝo rapide progresos ; via virto iros antaŭ vi ; la gloro de la Eternulo gardos vin malantaŭe. *Jesaja 58.8.*

Esperanto-Asocio de New York kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963. Dormont.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, LOONOPZAND (N. Br.), Nederlando.

Egiptaj glumarkoj Zamenhofaj kaj sfinksaj po 3 respondkuponoj por 100. Mendu ĉe Nassif Isaac, P.O. Box 350, Cairo.

Deziras aĉeti librojn, vortarojn, broŝurojn enhavantajn la vortojn aŭ esprimojn uzatajn en televidio-industrio, ĉeĥa, esperanta, rusa, germana, Iver Svarstad, Box 181, LOS ANGELES 12, Calif., Usono.

Bournemouth. Propagandekspozicio okazos 3-5an septembro. Danke akceptos taŭgan materialon Laurie, 6 Marlborough Road, BOURNEMOUTH, Anglujo.

Vizitu Bonn, la urbo de Beethoven ĉe la bela Rejno ! Esperantlingvan faldprospekton sendas kontraŭ 1 rpk. Ernst Kind, del. UEA, Kirschallee 5/II, BONN, Germanujo.

Barcelona, Hispanujo. S-ro José Gomez Ibarras, str. Calabria 222, tda. deziras kor. kun antropozofiaj kuracistoj. Serioza kontakto.

Sardanyola (Barcelona), Hispanujo. Esperanto-Grupo kun 40 gelernantoj deziras korespondi pri ĉiuj temoj per letero aŭ il. pk. Interŝanĝos revuojn, pm., k.t.p. Certe respondos. Skribu al S-ro Jozefo Pla, str. Las Flores 14.

Hispana samideano 17-jara deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo. Nepre respondos. Clemente Romeu, Carretera Manresa s/n, MOYA (Barcelona), Hispanujo.

Grupo en liceo angla bezonas Esperantaĵojn alilandajn por prepari ekspozicion. Nepre respondos. Adreso : Cartwright (instruisto), 61A Surrey Street, NORWICH, Anglujo.

Suda Brita Federacio, por propagandekspozicio je 28a de junio pri sia 25a datreveno de fondiĝo, bezonas salutkorespondaĵojn, broŝurojn, k.t.p. Skribu multnombre al S-ro C. Wilkes, 94 Athelstan Road, SOUTHAMPTON, Britujo. Nepre respondos.

Nova glumarko, filatela temo, 50 pecoj kontraŭ 2 intern. resp. kuponoj. Internacia Asocio de Poŝtmarkkolektantoj, Box 5085, GÖTEBORG 5, Svedujo.

SERVISTINO bezonata por sendependa lernejo enhavanta 50 internulojn. Longaj libertempoj, bona vivado, sufiĉa salajro. Propra ĉambro disponebla. Bonega okazo por lerni anglan lingvon kaj ekkoni Anglujon. Samideanino preferinda—vidu kovrilpaĝon 4. Lernejestro, Caius School, Kingston Buci, SHOREHAM-BY-SEA, Sussex, Anglujo.

Estontaj geinstruistoj deziras korespondi. Adreso : F-ino A. Middelkoop, Jonkerweg 11, HILVERSUM, Nederlando.

Letervesperon aranĝos 10 gekursanoj komence de junio. Nesje, INNDYR, Norvegujo.

Belga fremdultrafika servo. Bonvolu sendi : Eŭropajn vojaĝprospektojn, adresojn de vojaĝentreprenoj. Mi rekompencos. 109 Konijnenperken, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo.

Plifortigu mian propagandan sukceson ĉe grava altgrada lernejo per simplaj poŝtkartoj k.t.p. al Moderna Lingva Asocio, Cheadle Hulme School, STOCKPORT, Anglujo.

E. Berenyi, 18-jara, Kertész str. 33-II.5a, BUDAPEST, Hungarujo dez. kor. kun gejunuloj pri ĉiuj temoj.

Atentu !! Atentu !! Ĉiuj samideanoj el ĉiuj popoloj bonvolu alsendi la plej belajn popolfabelojn aŭ fablojn (Esperantigitajn) al A. Fehr, Lehrerseminar, LEBACH, Sarlando.


Salutpoŝtkartoj petataj por klubeto partoprenanta en lerneja ekspozicio Pentekoste. N.C.H. Lernejo, FARNBOROUGH, Hants., Anglujo.

Vesaka Sankta Plenluno, 2496, je la 9-a de Majo, 1952 : Budhanoj Esperantistaj deziras Pacon kaj Benojn al ĉiuj Ĝustaĵoj ĉie. (Reklamo en la Jarlibro).

Kontakto dezirata kun samideanoj kiuj volas korespondi pri sanigaj kreskaĵoj : krome mi serĉas samideanojn en sudaj landoj kiuj sendos al mi kelkajn semerojn de teo kaj kafoarbustoj kaj de palmoj kaj aliaj subtropikaj kreskaĵoj por mia hejma kulturado. Jaromir Pavlacký, VESELI nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Lernigu viajn infanojn laŭ la angla maniero !

CAIUS



SCHOOL

Kingston Buci, Shoreham-by-Sea, Sussex, Anglujo.

Telefono : Southwick 2681

Internulejo por 50 knaboj 7 ĝis 18-jaraj

Eksterulejo por geknaboj 5 ĝis 18-jaraj

Alloga biendomo historiplita, en kiu iam dormis la reĝo Georgo IV-a ;
antaŭe sidejo de Generalo Sir Frederick Goringe. Vasta sportejo.

Alilandanoj estas tute bonvenaj ! Anglan lingvon oni lernas per rekta
interrilato kun anglaj infanoj kaj ankaŭ en aparta lernantaro. Lingvoj
franca, germana kaj Esperanta parolataj

Maro $\frac{1}{2}$ km., montetaro 1 km., Brighton (plej bone konata el marbordaj
urboj de Anglujo) 9km., Newhaven 30km., Londono 80km.

* * *

Havebla ankaŭ por ferioj, konferencoj, someraj
lernejoj, k.t.p., kun aŭ sen instruado kaj ekskursado

Skribu al la lernejestro tuj !